

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 545 (4) APRILO 1951



S-ro Pickwick alvenas en Ipswich (*vidu p. 117*)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj (kun membreco
kaj jarlibro 12ŝ. 6p.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅛ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj
Eldonnumero 6500



Enhavo

Specialaj artikoloj :	paĝo
Memoraĵo je la patro de l'higieno : G. Agricola	97
Montgrimpado en Suda Ameriko : T. Sekelj ..	101
Germana serur- kaj metalligaĵ-muzeo : D-ro Fentsch	106
La Atoma Bombo : poemo : C.J.C.	111
Alveno de S-ro Pickwick en Ipswich : C. Dickens	117
Konstantaj rubrikoj :	
Tra la mondo Esperantista	99
Vivo Virina	109
Nia Forumo	110
El la Oficejo	111
Recenzoj : Ariel (M.S.) ; Jarlibro de U.E.A. (G.P. de B.) ; Elementoj Latinidaj (J. Régulo Pérez) ; Marista Terminaro (C. Henriques)	112
Niaj kunlaborantoj : Einar Adamson	115
Enigma Konkurso	116
Internacia Konkurso	118
Por via distro	119
Radio	120
Universala Kongreso 1951	121
Felietono	123
Oficiala Informilo	127

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 545 (4)

Aprilo 1951



Georges Agricola :

Memoraĵo je la patro de l'higieno

SOLVO de grava problemo estas ligita kun München. Inter la distingitaj homoj, kiuj portis la nomon de tiu-ĉi urbo tra la mondo, konvenas citi du, verajn bonfarantojn al la suferanta homaro: Röntgen la trovinton de la X-radioj (kiujn oni nun ĝenerale konas *Röntgen-radioj*), kiu instruis en München 1900–1920; la duan, kiun celas la jenaj linioj, **Max von Pettenkofer**, kiun oni nun prave nomas la *patro de la higieno*. Je la deka de februaro* 1951 pasis kvindek jaroj de kiam tiu-ĉi eminenta viro, 83-jara, formetis sian vivon—tragedia sorto.

Eksterordinara vivo! Lernanto en apoteko, teatra aktoro, apotekisto, kuracisto, profesoro pri medicino kaj kemio, prezidanto de la Bavara Akademio de la Sciencoj! Universala spirito, kiajn la homaro produktas avare, sed kiuj redonas scion kaj povon centmiloble.

* Tiu-ĉi artikolo estis destinita por la februara numero de *Esperanto*, sed ne estis finita pro atako de gripo ĉe la aŭtoro.


Kemiisto kaj fiziologo, Pettenkofer iniciatis la kreon de la unua katedro pri *higieno*. Kiu memoras la tempon en kiu aperis en la gazetaro longaj artikoloj pri tiu-ĉi ĉefa kondiĉo de sana vivo — la pureco — konstatas, kiom ĝenerala fariĝis la kompreno pri iuj vivaperaĵoj (ne ĉiam estetikaj) kaj la praktika konkludo tirita el ĝi. Higieno fariĝis magia vorto, origino de kolosa industrio kuniganta, de la simpla sapo ĝis serumo profilakta, la plej diversajn produktaĵojn. Se la meza vivdaŭro de la homo—precipe en okcidentaj landoj — altiĝis konsiderinde post 1900, la laboroj de Pettenkofer estas ligitaj je tio.

La specialaĵo de Pettenkofer estis la higieno de loĝado, ĝenerale, de loĝadkondiĉoj, de la kemia esploro de la grundo aŭ tero, kaj la epidemologio. Estis li, kiu trovis la kaŭzon de la rapida disvastiĝo de la ĥolero. Li pruvis tion per sia baza laboraĵo *Esploro pri la disvastiĝo rapida de la ĥolero* klasika verko

aperinta en 1855. La malpurigo de la subtera akvo estas unu el la kaŭzoj pri la ekesto de epidemioj. Praktikan pruvon li povis prezenti per tio, ke li sukcesis forigi en München la kloakfosaĵojn kaj la akvopumpilojn. Starigintegrandiozanakvokondukilon el la montaro al München, li reiris al la tempo de la antikvaj homoj. La Romanoj neniam uzis akvon el sub la urboj sed ĝin kondukis de malproksimaj montoj al la centroj, kiel atestas la gigantaj akvokondukiloj de tiu epoko. Higienaj trinkakvo kaj kanalligado forigis la ĥoleron kaj tifon. München estis urbo regule suferinta de tiuj-ĉi du plagoj de la homaro. Post tiu unika eksperimento—ĉar tio ja estis la higienigado de la akvo—München ne plu konis epidemiojn kaj iĝis unu el la plej higienaj urboj germanaj.

Hodiaŭ la esploroj kaj instruoj de Pettenkofer estas ĝenerale rekonitaj reguloj. Siatempe li devis lukti kontraŭ la opinio de la bacilteoriuloj, kiuj vidis la originon de la epidemioj ekskluzive en la baciloj kaj malatentis la apudajn cirkonstancojn. En fundamenta verko pri la higieno, eminenta fiziologo von Voit rekonis, ke Pettenkofer levis la higienon al la rango de memstara scienco, kies ĉefa tasko estas “fortigi la homon en la batalo pri la vivo.”

La tuta vivo de Pettenkofer estis dediĉata al la homamo, kaj en la nuna tempo, kiam la fantomo de milito ree aperas, la dankamemoro pri vera homarano havas duoblan signifon. Pettenkofer plenumis neforgeseblan servon al la homaro.



**Inter la plej bonaj stilistoj
en Esperanto certe rangas
Mason Stuttard.
Konstatu mem per**

MORTO DE TRAJNO : detektiva romano de Freeman Wills Crofts, fama angla verkisto. Tradukita de Mason Stuttard. 256 paĝoj, tole bindita. Prezo 9 ŝil., aŭfranko 6p.

VIRINETO EN BLUO kaj aliaj rakontoj (EPOKO n-ro 8). Originale verkitaj de Mason Stuttard. 150 paĝoj; broŝurita. Prezo 3 ŝil., aŭfranko 3p.

Eldonitaj de The Esperanto Publishing Co. Ltd.

**Mendu ĉe
Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo
aŭ ĉe enlanda libroservo**



Tra la Mondo Esperantista



Britujo

Eduka ekspozicio : Okaze de la Festo de Britujo okazos imponaj ekspozicioj ne nur en la Festaj Domegoj, sed en multaj partoj de Londono, eĉ de Britujo, per kiuj oni klopodos bildigi la vivon en Britujo. En la *College of Preceptors* en Londono—institucio fondita en 1846—okazos granda ekspozicio *La Instruisto tra la Jarcentoj*. En la kadro de tiu ekspozicio la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj ricevis inviton partopreni tiun aferon, kaj je la specifa dato 7 julio 1951 okazos demonstracio kun lernejoj en la posttagmezo inter 14-30 kaj 16.30. Je 17-30 okazos prelego pri la starigo kaj kresko de la Esperantista Instruista movado. Kolegoj vizitontaj Londonon dum tiu periodo estas varme invitataj partopreni la ekspozicion. Ĉiujn informojn de F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30.

Skota kongreso : La 46-a Skota Kongreso de Esperanto okazos 25-28 majo 1951 en Dundee. En la programo troviĝas Esperanta diservo, dramo *Otello*, vizito al ŝipo de Festo de Britujo. Informojn ĉe : S-ro J. Paterson, 26 Ancrum Drive, Dundee, Skotlando.

Danlando

Internaciaj FERIAJ Kursoj : Sub aŭspicio de U.E.A. okazos en Helsingør, Danlando la kutimaj kaj

jam famaj Internaciaj Kursoj. La dato estas 22-29 julio 1951. Ampleksa kaj interesa programo estas jam aranĝita. Alloga prospekto estas nun disponebla, kaj estas konsilinde jam nun turni sin por informoj al : S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Francujo

Kunĝado de Eduk-Ministrejo : Per speciala cirkulero la Ministrejo pri publika instruado informis la rektorojn kaj ties subulojn, ke la Unuiĝo Esperantista Franca sendos senpagan dokumentaron pri Esperanto al ĉiuj lernejestroj de la lando. Ĝi petas de ili, ke ili akceptu favore la petojn de reprezentantoj de U.E.F. kaj liveru la necesajn adresojn por tiu sendado.

Landa Kongreso : La 43-a Nacia Kongreso de U.E.F. okazos en Lyon dum Pentekosto 1951. S-ro Edouard Herriot, Prezidanto de la Franca Parlamento kaj urbestro de la urbego Lyon skribe konsentis ĉeesti la solenan malfermon, kiel Honora Prezidanto. La kongreso okazos en la Fakultato pri Juro kaj la Akceptejo troviĝos en la urba turisma oficejo, meze de la ĉefplaco de Lyon. Dum la kongreso okazos konstanta ekspozicio de Esperanto en la Jura Fakultato.

Enlanda propagando : Por atingi plej vastan propagandon la franca movado disponas pri nacilingva gazeto *Essor*. Tiu gazeto jam atingis sian sesan numeron. Ĝi aperas trimonate kun eldonnombro inter

5000 kaj 8000. Ĝi apartenas al S-ro Castel, presisto, kiu liveras ĝin je tre malalta prezo. La gazeto estas sendependa, sed helpata kaj konsilata de la landa organizaĵo. La abonantoj ne estas grandnombra ĉar oni opinias, ke tiu gazeto estas ĉefe prilaborita por esti disdonata aŭ disvendata *ekster la esperantistaro*. Tial ĉiutrimonate la francaj grupoj kaj societoj mendas rekte de la presisto kvantojn inter 50 kaj 200 por distribuado en sia loko. La landa asocio mendas kvanton por dissendo al personoj, kiujn oni supozas favoraj al Esperanto. La ĉefaj redaktantoj precipe prizorgas, ke la gazeto restu je alta nivelo per ofta aperigo de artikoloj prilingvaj verkitaj de kompetentaj profesoroj. Ĝis nun la afero montriĝis kuraĝiga kaj estas taŭga ekzemplo de kunlaborado inter landa organizaĵo kaj bonfara presisto.

Germanujo

Instruista kunveno : Antaŭ la 36-a U.K. okazos de 26 julio ĝis 4 aŭg. en bela bavara regiono inter la Lagoj Walchen kaj Kochel kunveno de Esperantistaj instruistoj. Profesiaj temoj estos diskutataj kaj oni insistas pri serioze sinteno, bona kaj flua parolo de la lingvo. Programon kontraŭ respondkuponon de : F-ino Jeanne Dedieu, 3 Rue Arzac, Toulouse, Francujo. Oni povas senprokraste aliĝi per : Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer, (13) Kitzingen, Germanujo. Kosto de partopreno 60 DM. por aliĝo kaj dektaga restado. Pagojn al poŝtĉeka konto 72694, Karl Kröber, Postscheckamt, Nürnberg.

Izraelo

Revigliĝo : La Esperanto-movado en Izraelo pasintjare iom revigliĝis

sekve de la enfluo de migrantoj el ĉiuj landoj de Eŭropo, inter ili pluraj Esperantistoj. La estraro de la landa organizaĵo publike invitis per la gazetaro ĉiun novalvenintan samideanon sin anonci ĉe la adresoj : Jerusalem—Ĉefdelegito de U.E.A. ; Tel-Aviv—N. Drezner, 35 Nahlat-Benjamin str. ; Haifa—Armoni, 72 Arlozorof str. En la pasinta Zamenhofa Festo partoprenis 66 gesamideanoj.

Nova lernolibro : Aperis nova lernolibro Hebrea-Esperanta. Iniciatinto estis S-ro Havkin, prilaboris ĝin Rabeno D. I. Rabinovitz-Teitz kaj S-ro N. Z. Maimon. Ĉi tiu lernolibro aperis pere de financa subvencio de U.E.A. kaj konforme al ties programo helpi al la propagando en landoj, kie oni mem ne kapablas pro diversaj cirkonstancoj.

Novzelando

Landa Kongreso : Malgraŭ fervojista striko, kiu preskaŭ paralizis la ĉefajn komunikilojn, la 16-a Novzelanda Esperanto-Kongreso bone sukcesis. Ĝi okazis en Palmerston North, dec. 27–31 1950. Vicurbestro de la urbo bonvenigis la kongreson kaj D-ro C. J. Adcock, lekciisto pri psikologio en la Universitata Kolegio Victoria faris gravan kontribuon al la paroladoj. Okazis kvar aferkunsidoj kaj speciala kunsido de U.E.A. en kiu la ĉefdelegito S-ro Brendon Clark prezentis jarraporton. S-ro Bertram Potts, dumviva Honora Prezidanto de la Landa Asocio, paroladis pri lingvaj punktoj. Ekskurso al elektroforto-produktejo ĉe Mangahao, kaj tre bona koncerto estis distraĵoj de la kongreso.

Tibor Sekelj :

Montgrimpado en Suda Ameriko

Ekstrakto el prelego en la Internacia Somera

Universitato, Bournemouth

MI invitas vin ĉiujn akompani min tra la diversaj etapoj de la grimpado al Akonkagvo.

Unue ni ŝipveturu dum du semajnoj por alveni en Buenos Aires, ĉefurbo de Argentino, kaj de tie post dudek-kvarhora trajnveturo ni alvenas en la provinco Mendoza, en kiu troviĝas la giganta monto. El la urbo Mendoza la trajno alportas nin ĝis la somerumejo nomita Ponto de Inkaoj pro belega natura ponto. Tie ni preparas definitive la ekspedicion kaj luas la necesajn mulojn, kiuj de tie portos niajn ŝarĝojn, kaj krome ni dungas kelkaj mulgvidistojn, spertajn en la manipulado de la bestoj en la montaro.

Poste ni ekrajdas tra la Horkona valo en kies fino je nuraj 30 km. de ni leviĝas la majesta neĝkovrita montego, brilanta en la sunlumo. Ĝi troviĝas en Argentino, sed je apenaŭ 15 km. de la ĉilia landlimo. Antaŭe oni supozis, ke ĝi estas vulkano sed antaŭ nelonge oni konstatis, ke ĝi ne estas vulkano, sed ke la vulkanaj ŝtonoj kiuj ĝin konsistigas, apartenis iam al aliaj vulkanoj, kaj estis tie amasigitaj sekve de iuj kataklismoj.

La rajdado estas plena je incidentoj, ĉar ofte la ŝtonoj elglitas el sub la piedoj de la muloj, kaj tiuj ĉi falas kaj ekruliĝas laŭ la deklivo. Pro la multaj incidentoj ni preskaŭ ne havas tempon por observadi la belegan panoramon ĉiumomente ŝanĝiĝantan. Post du tagoj da konstanta sed

malkruta ascendo ni atingas la lokon nomitan Placo de Muloj, kie ni laŭkutime starigas nian bazan tendaron.



Oni ŝarĝas la beston !

Ni troviĝas je alto de 4.200 metroj super la marnivelo, kaj estas ja nature ke kelkaj el vi sentas la altecmalsanon. Ĝiaj simptomoj estas la malfacilo en la spirado pro la nesufiĉa kvanto de oksigeno en la aero ; pro la malalta aerpremo oni sentas kapdoloron, kaj kelkfoje kapilaro en la nazo aŭ en la buŝo krevas kaj eksangas. Ni rapide laciĝas, sentas kapturniĝon se ni ekkaŭras aŭ subite leviĝas, kaj ni ne emas manĝi nek dormi. Sed ĉio ĉi ne estas danĝera, kaj post kelktaga restado en tiu ĉi baza tendaro ni "alklimatiĝas" t.e. alkutimiĝas la korpon al normala funkciado en la ŝanĝitaj cirkonstancoj. Pro tio ni restas ĉi tie kelkajn tagojn, kiujn ni profitas por fari ekskursojn kaj

promenojn en la ĉirkaŭaĵon, kaj eĉ surgrimpi iun el la najbaraj montoj. Sed neniukaze ni devas preterlasi viziton al la belega glaciejo Horkono, kiu situas je nur 200 metroj de nia tendaro. Ni alproksimiĝu al la glaciejo konsistanta el plurajn kilometrojn longa vico de glaciaj turoj, kaj admiru kiel iliaj pintoj leviĝas je kvardek metroj super nia kapo, kaj desegnas siajn konturojn tie en la profunda bluo de la ĉielo. La altaj turoj kaj muroj sekvas sin unu post alia en ĉarma malordo. Ili estas formitaj de la ventoj kiuj fendas kaj poluras la glaciaron, kiu dum la forpaso de la jaroj plenigas la valon per la neĝblovaĵo veninta el la pli elstaraj partoj de la monto.

Ni provas surgrimpi kelkajn el tiuj turoj kaj por tio ni surmetas sur la najlumitajn ŝuojn la grimpferojn t.e. arojn de 5-centimetrojn longaj najloj konvene kunligitaj po unu aro por ĉiu ŝuo. Ili estas uzataj speciale dum grimpadado sur glacia surfaco, kaj je ĉiu paŝo la najloj eniĝas en la glacieron, evitante glitadon. Per la grimppioĉo ni faras ŝtupon en la glacio, kie tio estas necesa, kaj por ataki la vertikalan glacimuron ni uzas specialajn najlegojn. La roknaĵoj ne estas uzeblaj ĉi tie ĉar ili ne havas sekurecon en la glacio. Tial ni enigas per martelo en la muron kelkajn tuboformajn glacinaĵojn kaj tra ilia feroringo ni trapasigas ŝnuregon por sekurigi nin per diversspecaj ligaĵoj.

Poste ni eniras glacigroton kien nur enpenetras iom da blueta lumo tra fendaĵo. La groto ŝajnas mistera kaj memorigas paĝon el ferakonto. En alia loko ni trovas kelkajn gigantajn "glacifungojn", konsistantajn el kvin aŭ pli da metroj alta glacia kolono kun granda ŝtono, kvazaŭ ĉapelo, sur

ĝia supro. Nia unua demando estas, kiu strangulo levis tiel alten la plurajn tunojn pezan ŝtonon? Sed la klarigo pri la ekesto de tiuj "glacifungoj" estas tute simpla. Dum vintro la vento kunblovas en la valon grandan amason de neĝo, kies alteco atingas ĝis dek metroj. Samtempe okazas lavangoj, kiuj alportas de la monto-supro grandajn ŝtonojn kaj lokas ilin sur la neĝon. Dum la sekvantaj printempo kaj somero la suno degeligas la neĝon; sed ĉar la ŝtono faras ombron, sub ĝi la neĝo restas netuŝita de la sunaj radioj. Kaj dum ĉirkaŭe la neĝo tute malaperas, tiu kiu troviĝas sub la ŝtono glaciĝas kaj iom maldikiĝas en gracian kolonon subtenantan la grandan ŝtonon.


Post septaga restado en Placo de Muloj ni sentas niajn korpojn kaj spiritojn perfekte adaptitaj al la medio, kaj decidas translokiĝi pli alten al la bivako nomata *Nesto de Kondoroj* je 5.500 m. super la marnivelo, kie ni alvenas en du grupoj. Denove ni sentas ĉiujn simptomojn de la montarmalsano sed nun ni jam scias kiel ni devas kondukti por ke ĝi rapide forpasu. Sed en tiu ĉi altaĵo aldoniĝas al tio nova malfacilaĵo: la manko de akvo. Tial ke tie neniam pluvas, sed nur neĝas, por ekhavi iom da akvo ni devas degeligi neĝon aŭ glacieron, kaj ankaŭ tio ne estas facila tasko. Unue ĉar pro manko de oksigeno en la aero eĉ la alumetoj ne ĉiam povas ekbruli, kaj same ankaŭ la bezinaj varmigiloj fariĝas tre kapricaj. Fine ni plenigas grandan poton per neĝo kaj lasas ĝin dum longa tempo sur la fajro. Kiam ni malkovras la poton ni kun seniluziigo rimarkas, ke la rezulto de la laboro estas apenaŭ fingrodika

tavolo da akvo sur la fundo de la poto. Do ni devas ripeti plurfoje la agon sed tamen ni avide trinkas ĝin ĉar la korpo senakviĝas pro ŝvito kaj elvaporigo kaj ni bezonas remeti en ĝin iom de la necesa elemento. Se ni decidus kuiri ion ni havus la strangan sperton, ke por havigi ekzemple malmolajn ovojn, ni bezonas kuiri ilin eble dum tuta horo, kaj dum la akvo bolas ni povas senhezite enmeti la manon. Pro la malalta aerpremo la akvo tie bolas proksimume ĉe la varmo de 70 gradoj celziaj.

Post kelkaj tagoj de restado en tiu ĉi alta bivako ni konstatas, ke ne ĉiuj membroj de la ekspedicio adaptiĝas kun la sama rapideco. Ni estas naŭ, kaj nur tri el ni fartas bone. La ĉefo de la ekspedicio, Johano Georgo Link, tre sperta mont-grimpanto, diras, ke tiu ĉi alteco estas la limo por multaj personoj kaj tial li rekomendas al ni tri, kiuj fartas perfekte, ke ni daŭrigu la grimpadon por ne malŝpari la belajn tagojn kiuj sin prezentas. Tiel ni faras, kaj Bertone, Zechner kaj mi ekmarŝas supren, portante pezegajn tornistrojn sur la dorso kun du tendoj kaj tri dormosakoj krom la personaj bezonaĵoj kaj nutraĵo por pluraj tagoj. La pezo portata ŝajnas duobligi kaj triobligi kaj post deko da paŝoj ni ĵetas nin sur la neĝon por ripozi iomete kuŝe. Tiel ni daŭrigas dum la tuta tago kaj antaŭ vesperiĝo ni atingas la plej altan bivakon, kie ni starigas la tendojn. Ni nomas la lokon *Rifuĝejo Link* kaj ĝi troviĝas je la alteco de 6.200 metroj.

Ni jam sentas, ke la fluo de la sango en nia korpo ne estas normala kaj ke la pulmoj laboras per duobla fortostreĉo por ricevi la oksigenon necesan por la korpo. Ni konscias,

ke al tiu altaĵo ni ne kapablas adaptiĝi kaj tial ni decidis la sekvantan matenon ekmarŝi por provi la finan etapon.



Tipo sceno en la alto

Je la kvara matene ni ekmarŝas, ferminte unue la tendetojn kaj postlasante noton, laŭ kiu nur ni respondecas pri niaj vivoj se io okazos dum la grimpado. Je la forta lunlumo kun fantoma malrapideco ni antaŭenpuŝas niajn korpojn vestitajn per pluraj dikaj vestaĵoj, kaj super ili silka supervesto ventorezista. De la kapo videblas nur la okuloj, kiujn je la unua taglumo ni kovras per malhelaj okulvitroj, dum sur la manoj ni portas du parojn da gantoj, kaj la piedojn ŝirmas du aŭ tri paroj da lanaj ŝtrumpoj. Ni marŝas malrapide, kaj niaj paŝoj ritme sonas en la silenta pejzaĝo en kiu la arĝentaj reflektoj de la lunlumo pentras fantaziajn bildojn. Por ne perdi energion ni silente marŝas kaj post ĉiu dudeko da paŝoj haltas por ripozi. La malvarmo dolorigas niajn piedfingrojn. La plej malalta temperaturo kiun ni mezuras atingas minus 30 gradojn C. Nur je la oka horo, kiam la suno aperas, ni kuraĝas eksidi por froti la piedojn

per neĝo por reekcirkuligi en ili la sangon. La malgranda karavano daŭrigas sian ascendon, peze spiregante kaj kun la koro sovaĝe batanta. La pejzaĝo konstante ŝanĝiĝas sed super la kapo firme, kiel nekonkerebla fortikaĵo, staras la ŝtona piramido de Akonkagvo, nia fina celo.

Je la 11-a horo ni atingas la piedon de la nur 200 metrojn longa fendego alkondukanta al la pinto. Do ni troviĝas je alto de 6.800 metroj. Mallonga ripozo kune kun iom da fruktoj, kiujn ni estas portintaj, refortigas nin sufiĉe por povi daŭrigi. Sed nun sekvas la plej malfacila parto. Ĉar se ĝis tie ne estas bezonita iu ajn speciala lerteco, nun aperas sur nia deviga vojo grandaj ŝtonoj, kiujn estas necese surgrimpigi, uzante la fortojn de la brakoj, kaj necesas solvi kelkajn grimpajn problemojn. Tia tereno en la Alpoj aŭ ie alie malpli alte, signifas nenian malfacilaĵon, sed ĉe preskaŭ sep mil metroj ili fariĝas preskaŭ netransireblaj baroj ĉar la grimpanto jam ne havas fortojn sufiĉajn nek en la brakoj nek en la spirito.

Dum du horoj ni baraktas kontraŭ tiuj rokoj kaj fine, je la dektria horo ni troviĝas sur la pinto de la monto.

Kio estas la unua afero, kion oni faras, alveninte al la montosupro? Jen kio: oni lasas sin fali teren kvazaŭ malplenan sakon ĉar nenion alian deziras la korpo nek la spirito, ol ripozon. Iliaj fortoj estas ja streĉitaj al la maksimumo dum multaj horoj kaj nun subite malstreĉiĝas ĉiuj nervoj kaj muskoloj kaj sentoj kaj pensoj. Tiel ni kuŝas kelkajn minutojn, sufiĉajn por ekzameni la sentojn de la homo atinginta tiel longe deziratan celon.

La unua sento estas sendube tiu de la venkinto, de la triumfanto en la lukto inter la homo kaj la naturo ĝuste tie, kie la naturo disponas je tiaj senkomparaj bataliloj, kiaj manko de oksigeno, la malalta aerpremo, la terura malvarmo kaj la neĝaj ŝtormoj, kaj kie la homo, spitante sian fizikan konsiston, atakas kun sia forta volo kiel sola armilo. Estas ja vere nova poento en la longa batalo inter la homo kaj la naturo, de la momento kiam tiu la unuan fojon atingis fari fajron ĝis la liberigo de la atomo. Do ni estas grandaj, triumfantaj, fieraj.

Sed aliflanke meze de tiu grandioza montaroceano kie majestaj kaj timigaj gigantoj ĉirkaŭas nin, la homo malgrandiĝas kaj konsciiĝas pri tio, ke li ja estas nur eta sablero, momente spitanta la naturon, sed kiu en la sekvanta momento povas esti forblovata de uragano kiel malpeza plumo. Ni klare vidas, ke la homo ne estas la centro de la kreitaĵaro, sed nur tre eta kaj modesta parto ĝia.

Kaj fine aperas, kvazaŭ fajrero, ankaŭ alia penso. Dum la grimpado ascendis konstante ne nur la korpo sed ankaŭ la spirito, kaj estus malfacile diri, ĉu la korpo alportis la spiriton, aŭ la spirito la korpon tiel alten. Kaj dum la videbla parto de nia estaĵo malproksimiĝas ĉiam pli kaj pli de la tero, de la loĝata kaj loĝebla nivelo de nia planedo por alproksimiĝi al la stratosfero, la spirito ankaŭ, kune kun ĝi, forlasas la teron kaj kun ĝi la ĉiutagajn zorgojn, ĉiutagajn pensojn, por alproksimiĝi al la eteraj sferoj spiritaj. Sed ĵen subite haltas la korpo ĉar ne plu ĝi havas apogon por daŭrigi la ascendon. Sed tio ne okazas al la spirito, ĉar ĝi ja ne bezonas apogon.

Ĝi nun ŝvebas inter la tero kaj la ĉielo, inter la mizera, ĉiutaga rampanta vivo, kaj la eteraj regionoj en altaĵoj revataj. Kaj mi momente havas la impreson, ke se mia spirito decidus daŭrigi sian ascendan vojon, seniĝinte je sia korpa ujo, tiu ĉi ago estus nenia salto, sed male la plej natura transiro el tiu ĉi mondo en la alian . . .

Sed tiun ĉi fojon nenio simila okazas. Post kelkaj minutoj ni pene leviĝas kun la korpo kaj la spirito, ĉio en sia loko, kaj ni ekrigardas ĉirkaŭ ni. La pinto de la monto estas eta platformo tridek metrojn longa kaj dek metrojn larĝa. Ĉirkaŭe ni vidas ringon da montgigantoj neĝkovritaj kaj sunbanataj inter kiuj tie kaj jeĥe ni rekonas iun konatan silueton. Okcidente vidiĝas la Pacifika Oceano, trans tuta Ĉilio, je 150-kma. distanco kaj oriente la verdaj pampoj argentinaj, perdiĝantaj en la nebulo. Majesta panoramo! Neforgesebla vidaĵo!

Sed la vera rekompenco por la fortostreĉo kaj la risko tamen estas la spirita travivaĵo.

Post kelkaj mezuroj pri aerpremo, temperaturo, alteco, ventforto k.t.p. ni disigas ŝtonmonteton starantan en la plej alta punkto kaj elprenas el ĝi metalan skatoleton kaj malfermas ĝin. La granda kvanto da flagetoj, flagoj, paperoj kaj aliaj objektoj, kiujn la skatolo enhavas, apenaŭ enteniĝas. Ĉiuj tiuj objektoj estas lasitaj tie de la antaŭaj montgrimpantoj atingintaj la pinton, kaj ni rajtas forporti ilin, kiel trofeon kaj kiel pruvon pri nia sukceso. Niavice, ankaŭ ni plenigas la skatolon. Esperantan flageton mi lasis tie kun surskribo pri ĝia signifo. Ankaŭ ni subskribas libron, kiu troviĝas en la skatolo por tiu celo.



T. Sekelj enmetas la Esperanto-flagon en la metalan skatolon sur Akonkagvo (7.035 m.)

Post unuhora restado ni ekmarŝas malsupren. La descendo ankaŭ estas malfacila kaj niaj fortoj estas tiom elĉerpitaj, ke pro la tremado de niaj okulaj nervoj diversspecajn halucinaciojn ni vidas. Je la dudeka horo ni alvenas al la plej supra bivako kaj tie trovas la ceterajn membrojn de la ekspedicio, kiuj intertempe suprengrimpis tien . . .

(La resto de la prelego traktas pri la tragika sorto, kiu atingis la ceterajn membrojn de la ekspedicio, kiuj faris provon al la supro, kaj pri la esplor-ekspedicio kiu longe poste malkovris la veran historion de la dramo ludita sur la blankaj altoj.—Red.)

Internaciaj Feriaj Esperanto-Kursoj

en **Elsinoro**, Danlando, okazos
22–29 de julio.

Ni invitas vin partopreni.


Detala prospekto havebla ĉe

**L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando**


La germana serur- kaj metalligaj- muzeo en Velbert

de D-ro Fentsch, kuratoro

KIU rezignus hodiaŭ volonte sian domŝlosilon? Ĝi estas sekuriga kaj manuzebla, malsame je la malnovaj ŝlosiloj. Uzante ĝin, oni pripensu momente, de kie ĝi venis. Malmultaj homoj scias, ke la eŭropa centro de la serurfabrikado estas Velbert, urbeto kun 41.000 loĝantoj, urbeto inter la urbegoj Essen, Düsseldorf, Wuppertal kaj Duisburg. Ĝi estas urbeto sur altebenaĵo imponanta super la ĉirkaŭaĵo. Ĝia silueto kun la multaj elstarantaj kamentuboj kaj la fieraj urbdomturo anoncas la industrion en ĉi tiu serurmetropolo.



Barokstila ŝlosilo ĉ. 1650–1740



Angulo de antikva forĝejo

Menciita unuafoje en j. 875, ĝi estis origine terkulturista enloĝigejo. Pro la malkovro tie de minaĵo, ferforĝado kaj uzinlaboro jam frue evoluis al famekonata industrio. Ni detale scias, ke jam de 1860 la velbertaj produktaĵoj — ŝoveliloj, marteloj, hakiloj, sed antaŭ ĉio seruroj—estis grandamase fabrikitaj kaj eksportitaj per ŝipoj sur la Rejno en Nederlandon. La velberta negocisto Vehlau vizitis regule la foirojn de Frankfurto,

kaj daŭrigis rilatojn kun aliaj regionoj de Germanujo.

Ĝis meze de la 19-a jarcento oni nur manlaboris la serurojn. En la laborejoj la majstro kun submajstroj kaj metiaj lernantoj fabrikis per




Antikva egipta dio ornamanta ŝlosiltruon

primitivaj iloj serurojn kaj ŝlosilojn. Oni faris ilin “el la mano”; t.e. oni tranĉis, fleksis kaj poluris la metalon. La multaj serurforĝejoj en kaj ĉe Velbert estis la ĝermejoj de potenca estonta industrio. Kiam en la “sesdekaj” jaroj la unua vapormaŝino alvenis en Velbert oni volonte akceptis ĝin kaj ĝin uzis. Unu post alia stariĝis muldiloj por ŝlosilfarado. Kiam la fervojo interligis Velbert kun la cetera mondo ĝi evoluis preskaŭ *amerike* kaj per tio pligrandiĝis la eksporto, kiu jam en la 19-a jarcento estis transmara.

Preskaŭ naŭ dekonoj de ĉiuj laboristoj en la serurindustrio vivis je la turniĝo de la jarcento en la regiono Velbert-Heiligenhaus.

La du militoj multe malutilis al la industrio en Velbert. Tamen la bona esencaĵo garantias, kiel la hodiaŭa situacio pruvas, la venkon super la tempaj kondiĉoj kaj la malfacilaĵoj.

Estis memkompreneble, ke la graveco de la serurfabrikado incitis, ne nur por la urbo sed ankaŭ por la tuta mastruma vivo, fondon de historia ekspozicio en kiu antaŭ ĉio la komercamiko kiu vizitas la velbertajn fabrikejojn estu instigata kaj instruata. La muzeo fondita en 1939 estis modesta komenco. Ĝi estis denove inaŭgurita en 1949 kaj jam estas bone vizitata el ĉiuj landoj. Aliaj muzeoj montras serurojn, sed tio ne estas ilia ĉefaĵo. En artmetiaj muzeoj oni elmontras serurojn laŭ ties vidpunktoj. En teknika muzeo, kiel la germana muzeo en München, oni konsideras nur la teknican parton. La velberta serurmuzeo kontentigas ĉiujn interesojn. La hejma metio kompreneble unuarangas. Komplete instalita forĝejo montras la penon de la pli fruaj labormetodoj kaj devigas nian respekton. Multaj ekspoziciaĵoj montras la vivmanieron k.s. el la metia pasinteco de Velbert. En la ĉefa parto de la muzeo oni prezentas la evoluon de la seruroj kaj rigliloj. Vidiĝas la primitiva riglilo kaj ĉiaj



Simpla sed genia tipo de seruro, funkciigebla nur per speciala ŝlosilo

diversaj sekur-aranĝoj, kiajn povis elpensi la intelekto. Ofte estis nur simplaj kampuloj, kiuj inventis ilin. Precipe interesas la tiel nomata "falriglosistemo", kiu estas disvastigita tra la tuta mondo. Antikvaj asiroj elpensis ĝin antaŭ miloj da jaroj. Tio similegas al la cilindra seruro, kiun eltrovis la usonanoj. La diversaj serurtipoj, kiel la pendseruro, transfalseruro, kestega seruro kaj porda seruro estas reprezentataj per longa vico, kiel ankaŭ la diversaj ŝlosiloj.


Apud la teknika parto valoras la arta. La muzeo tre atentigas, kiel la ekstera formo de la seruro dependas de la stila leĝo de la koncerna epoko. Laŭ la samaj vidpunktoj la muzeo prezentas la evoluon de la metal-ligaĵoj, kiuj estas formriĉaj kaj montras metian majstrecon.

Troviĝas fako kiu montras la seruron kaj ŝlosilon kiel simbolojn de kulturhistorio—ŝlosilpotenco,

ĉambelana seruro, framasona seruro k.s. Fine vicoj da tabuloj montras garniturojn, kiuj pruvas, kiel bezonaĵoj estas ligitaj al gravaj okcidentaj stiloj. Pentraĵoj kaj plastikoj de seruroj kompletigas la ekspozicion kun amaso da kompletaj elmontraĵoj, funkciigeblaj modeloj, sekretaj seruroj, nombraj seruroj k.s. Troviĝas blazonbildo de germanaj urboj, kun seruro en la desegno.


Velbert estas facile atingebla per aŭtobusoj el la jam menciitaj grandurboj, kaj la muzeon oni trovas en la kelo de la urbdomo meze de la urbeto. Ĝin oni facile rekonas per la granda ornamaĵo — fera ŝlosilego — ĉe la enirejo. La muzeestro ĝojus se li povus saluti multajn kongresanojn de la 36-a U.K. vizite al Velbert. Neniu lasas la muzeon sen parolo de sincera laŭdo.

*(Tradukita de H. Korell,
D. de U.E.A. en Velbert).*



Karakteriza ĉarniro kun metalfiligrano

La ŝlosilo al la plej sukcesa partopreno en la internacia vivo estas membreco de Universala Esperanto-Asocio, la plej granda Esperantista organizaĵo en la mondo. Varbu konstante !



Vivo Virina

Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas :

S-ino R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Kiu volas respondon, nepre sendu rpk. (Britoj pm.) por afranko. Tamen atentu, ke pro multokupiteco, S-ino Dhonau ne povas entrepreni ĝeneralan korespondadon.

Pensoj por gepatroj : La normala infano havas bonan cerbon kaj la naturan kapablon ĝin uzi, sed en la lernejo ili ofte iĝas malspritaj, maldiligentaj aŭ malprogresemaĵ. La kaŭzoj estas diversaj kaj komplikaj. Povas esti, ke la infano estas tro ŝirmata de la gepatroj kontraŭ normalaj riskoj ; eble oni petas, ke infano faru ion antaŭ ol li (ŝi) estas preta fari tion, aŭ pri kio li ne havas veran kapablon. Infano destinita de la naturo por praktika vivo eble estas devigata studi multajn librojn, k.s.

Gepatroj devus studi siajn infanojn kaj iliajn inklinojn. Antaŭ ĉio ili devas scii, ke infanoj lernas, kreskas kaj floras nur kiam ili sentas sin sekuraj kaj amataj.

Parfumo kaj personeco : Kiam vi aĉetas parfumon ĉu vi saĝe elektas aŭ ĉu vi nur legas la ŝorĉajn, poeziajn nomojn ? Provante parfumon en vendejo, fermu la okulojn kaj lasu vin gvidi de la unua impresio. Se la impresio estas agrabla la parfumo estas bona por vi, ĉar ni juĝas parfumojn per niaj emocioj. Se oni volas krei specifan atmosferon, parfumo povas helpi. Pezaj parfumoj estas pli taŭgaj en malvarma vetero ; tualetaj akvoĵ bonegaj dum la somero.

Internacia beleco

Fama usona modelino parolas pri belo en tri landoj. En Francujo oni ŝatas brilajn kolorojn kaj multe ŝminkas, sed oni ĉion faras subtilege. La virinoj estas tre elegantaj kaj ĉarmaj. La Usonaninoj serĉas ĉiam tion, kio estas nova, ekz-e baletistina aspekto. Ili alprenas la novon kaj forgesas ĝin tre rapide. En Anglujo la virinoj estas tre konservativaj.

Oni demandas : Kiel oni povas beliĝi ? Kaj jen respondo : Estu fidela al vi mem. Neniun imitu. Belo venas el la personeco, do eltrovu vian personecon kaj evoluigu ĝin. Oni devas esti sana, sekve necesas prudenta dieto, aparte multaj vitamenoj. Oni devas havi profundan intereson pri la vivo, pri la politiko aŭ la poezio, la muziko, la modo aŭ io alia. Oni restas juna nur kiam oni havas vivan intereson.

La recepto de la monato :

Terpoma sufleo :

Ingrediencoj : 2 ovoĵ, terpomoĵ, lakto kaj butero, spicoĵ.

Metodo : El la terpomoĵ faru pureon. Aldonu du ovoĵflavoĵ bone batitajn kaj spicitajn. Batu la ovblankon ĝis tre rigida ŝaŭmo, kaj tre delikate enfaldu ĝin en la pureon. Kuiru en modere varma bakforno kaj servu aŭ sen saŭco aŭ kun fromaĝa saŭco.



NIA FORUMO

PAROLAS LA LEGANTOJ

Pri la nomoj de la literoj

De matematika aŭ kemi-ista vidpunkto Prof. Waringhien eble pravas: pri tio mi ne estas kompetenta. Aliflanke mi opinias ke la enkonduko de la proponita nomaro en la lingvosciencan (fonetikon k.t.p.) ne estus konsilinda.

1-e. De lingvista vidpunkto la greka alfabeto ne okupas apartan rangon inter la multaj alfabetoj de la mondo, kaj se oni esperantigus la nomojn de ĝiaj literoj oni devus agi same rilate al la rusa, araba, hebrea kaj cent aliaj literaroj. Mi tial preferus ke almenaŭ lingvistoj daŭrige uzu la originalan (ne-esperantigitan) formon, kiel mi faras ekzemple pri vilaĝnomoj.

2-e. La proponita nomaro estas bazita sur fonetika klasifiko — la antikva greka — kiun modernaj fonetikistoj jam de longe ne plu akceptas. Estas nun konsentite, ke *h* kaj *ĥ* estas senvoĉaj frik(ativ)oj tute same kiel *f*, *s*, *ŝ*. Klaso de likvaj konsonantoj ne ekzistas; *l*, kiel *j* kaj *ŭ* estas duonvokalo, t.e. voĉa frik(ativ)o kun malforta *frikado*; *r* estas voĉa *trilo*, *m* kaj *n* voĉaj nazaloj. La nova nomaro do simple starigus la jenan regulon:—

voĉaj konsonantoj : finaĵo *a*—
escepte *jo*, *lo*, *mo* ;

senvoĉaj konsonantoj : finaĵo *o*—
escepte *ha*.

Sed escepto signifas komplikajon, mortpezon. Pro tio Esperanto kiam eble evitas ĝin.

Mi kaptu tiun ĉi okazon por

rimarkigi, ke ankaŭ la antikvaj latinoj nomis iliajn konsonantojn laŭ du malsamaj formoj por montri al kiu klaso ili apartenas. Sed anstataŭ apartigi la voĉajn de la senvoĉaj, ili distingis inter la ploz(iv)oj kaj la konsonantoj kiuj havas daŭran sonon. La unuajn ili nomis *pe*, *te*, *ce* (elparolita *ke*) ; *be*, *de*, *ge* ; kaj la duajn *effe*, *esse* ; *elle*, *erre* ; *emme*, *enne*. La kromaj nomformoj : *acce*, *ka*, *qu*, kaj *ix*, *y-graeca*, *zed*, signis literojn kiuj estis aŭ freŝe perdintaj ilian *apartan* sonon, aŭ malfrue enkondukotaj el la greka alfabeto. La konsonantoj J, V, W, aperis multajn jarcentojn poste.

G. Marin.

Protesto

Ĉu vera sano bezonas la dubegan helpon de la sciencisto ? Multe ĝenis min tiu demando post legado de la februara n-ro de *Esperanto*, en kiu estas tri frapaj artikoloj pri injektaj eksperimentoj al homoj.

Ĉu Naturo aŭ Dio ne provizas ĉion necesan al la korpo por vera sanstato ? Se la homaro vivus laŭ simpla, natura maniero ; manĝus sufiĉe kaj nur sufiĉe da simpla nutraĵo ; sciigus pri la grandaj avantaĝoj de ĝusta spirado ; akirado de pura aero kaj sunlumo ; ĝustaj uzoj de pura akvo ; taŭgaj korpaj ekzercoj ; tiam estiĝus vera sanstato de la korpaj funkcioj.

Multaj urboj, notinde Birmingham, ĉesigis difterian imunigon pro la tendenco al "Infantile Paralysis" (polio) en la imunigitoj.

Esperanto laboras por libereco kaj bonvolo, sed tiu libereco devas esti universala, devas esti por ĉiu vivanta kreitaĵo, homo kaj besto. Ankaŭ, libereco devas esti mensa. Ĉu ni devas akcepti la teoriojn de la teoriistoj



El la Oficejo

Petoj al la C.O. :

Ofte venas en la C.O. leteroj kun peto :

“Skribu salutleteron por apogi nian laboron”, “skribu al tiu kaj alia instanco”, “sendu al ni propagandmaterialon por nia ekspozicio” k.s. La skribantoj evidente supozas, ke en Rickmansworth deĵoras granda personaro en vasta kontoro. La vero estas, ke la tutan laboron faras **tri personoj**, el kiuj unu laboras nur parton de la tago. Bonvolu do ne peti letterskribadon. Rigardu la ciferojn pri korespondado en la jarlibro ! Propagandmaterialon ni ne disponas. En la gazeto ni regule listigas ĉiujn turismajn kaj reklamajn broŝurojn, gvidfoliojn k.s. La legantoj mem zorge kolektu tiujn aferojn tiel, ke kiam okazos ekspozicio ili jam posedos bonan materialon.

Reklamoj kaj anoncetoj : Ofte venas petoj, ke ni reklamu senpage. Ni volas sciigi, ke **ĉiuj** reklamoj kaj anoncoj en *Esperanto* estas pagitaj. Senpagajn anoncojn ni ne faras. Cetere la tarifo apenaŭ kovras la faktan koston de presado.

Libro-servo anoncas, ke denove estas disponeblaj *La Psalmaro*, prezo 9p., aŭfranko 2p., kaj *U.E.A.-insignoj*, prezo 1ŝ. 6p.

Nia Forumo

diktatore, simple pro tio, ke ili havas la bonvolon de la aŭtoritatoj ?

La artikoloj menciitaj estas : *Batalo kontraŭ kokluŝo*, *Savado de Infanoj*, *La alaska stafeto*.


H. Davies.

(iom mallongigita—Red.)

La Atoma Bombo

Post meditoj kaj reprovaj sciencistoj fine trovis la rimedon atomspliti. Nova kampo de progreso sin proponis al la homoj ; sed subite militistoj alproprigis la eltrovon por detruo. Jam milito sin trenadis kaj okazo estis preta por la provo grandastila. Flugmaŝinoj iutage sur Japanojn—la kobajojn—atombombon ekfaligis. Gigantega fumonubo fulgoforma teron tegis per funebra morttapiŝo ! Post eksplodo terurega, nur silento plej profunda sekvis ; jen teruro regis ! L'amasbuĉo kelkajn ŝparis, sed la timo paralizis dolorsentojn. Gape miris ili. Poste timpelate ili kuris en frenezo ĝis pro laco ili falis svene teren. Izolitaj ili estis. Nur kadavroj ĉirkaŭkuŝis, kaj l'aero veneniga pulmojn, haŭton brule vundis. Eĉ la ĉirkaŭaĵon ili ne rekonis ! Domoj, arboj, stratoj, placoj malaperis ! Nur amaso da rubaĵo, polvo, gasoj ! Ĉu la falo en Inferon ilin trafis ? Kia peko meritigis tian punon ? Kaj la mensoj konfuziĝis en pensado. Fatalisme en la koto ili kuŝis, Atendante morton. Ĝi al multaj venis. Nur areto tiun sperton trae vivis por atesti per la vundoj kaj turmentoj, kiom bruta kaj kruele la milito jam fariĝis per la novaj eltrovaĵoj de l'scienco. Tempo jamas por haltigi tiun kuron al frenezo kaj detruo ! Ni evitu, ke sciencaj akiraĵoj ĉefe servu al mortigo per milito ! Pacon mondan ni instruu al infanoj ; tio rompos barojn raso-religiajn ; la tolero portos al frateco homa. Utopio ? Tamen jen la sola savo kontraŭ buĉo laŭ plej bruta barbareco ! Nur la amo levos homojn Paradizen !

C.J.C.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

***Ariel** : José Enrique Rodó ; el hispana lingvo trad. M. Fernández Menéndez. Eld. Urugvaja Esperanto-Societo. 20×12.5cm., 157 p., broŝ., prezo 6ŝil. 6p., afranko 6p.

Konfirme al la eminenta pretendo de Esperanto povi peri al la pli vasta mondpubliko la literaturon kaj kulturon de malgrandaj nacioj, prezentiĝas al ni la jena verko, kiu posedas plurajn unikajn trajtojn. *Ariel* estas la **unua** esperantlingva verko el Urugvajo, kaj konvenas unue direkti al la eldonintoj varman laŭdon ne nur pro la gratulinda iniciato, sed pli pro la bela plenumo de ilia entrepreno. Per ĉi tiu verko la tradukinto konigas al ni la animon de vere impona poeto-filozofo, kapabla sondi la profundojn de la homa spirito kaj vekti eĥojn al sia alvoko al tio kio estas bona, bela kaj nobla en la homa lukto supren. Ne nur simbola titolo pri la enhavo, *Ariel* distingas ankaŭ la rafinitan stilon de la aŭtoro, trafan, multfiguran, bildelvokan, kiu brilas tra la unuaranga traduko de M. Fernández Menéndez.

La verko ne estas facile, nek facilanime, legebla. Simile al ĉia granda artverko, ankaŭ ĝi faras severajn postulojn al la eksterulo volanta partopreni en la krea genio de la artisto. La stilo estas de la antaŭa jarcento, kun longaj frazoj, kies ĉefaj propozicioj estas riĉe ornamitaj per tropoj kaj subfrazoj komplemente al la ideo aŭ argumento prezentata. La aŭtoro citas el multaj fontoj kaj scias nete kristaligi nocion per klasika aludo.

La temo de la verko—efektive prelego — estas la lukto inter la kulturo de la spirito, la kulto de la bono kaj la belo (simboligita per *Ariel*) kaj la vulgarigaj influoj de la “utilismo”, kiun la aŭtoro specife identigas kun la usona popolo. Necesas en tiu rilato memori, ke la verko aperis ĉirkaŭ la turniĝo de la jarcento, kaj ke la tempo mem malvalidigis multon, kion predikas la aŭtoro pri la destino de Usono. Kaj tamen eĉ hodiaŭ—ne nur pri Usono, sed ankaŭ pri Britujo, kie ekzemple la “niveligaj” tendencoj de la socialdemokratio antaŭnelonge incitis Compton Mackenzie akre plendi—la argumentoj de Rodó ĝuas ian cirkuladon. Tiaj “kulturdefendantoj” kutime ignoras la fakton, ke la mecenatismo de la klasika tempo, kiel ankaŭ tra la jarcentoj, havis siajn bazojn en aŭ la sklavsistemo, aŭ la salajrosistemo produktanta vastan mizeron kaj malsaton. Rodó mem, kiel ankaŭ la nuntempaj apogantoj de la “malnova kulturo” vidas nur la niveladon malsuprenan (laŭ starpunkto burĝa), sed malatentas la multe pli ampleksan pliboniĝon materialan kaj spiritan de la popolamasoj (nivelado suprenan), el kiu fontos sen ia dubo novaj tipoj de mecenatismo, nova kulturo, ŝprucantaj senpere el la vulgarigo, el la utilismo, el la “mezgradeco”. Tipoj de tio estas videblaj jam nun en Britujo, kie ekzemple sur la ĉefsidejo de la Londona transport-aŭtoritato niĉas skulptaĵoj de Epstein kaj en la popolrestoracioj de la landampleksa

entrepreno *Lyons* pendas multaj vidindaj ekzemploj de moderna pentroarto. La aserto de Renan (al kiu la aŭtoro montras apartan ŝaton) ke “la demokratio estas la entronigo de Kaliban”, kaj kiun defendas Rodó, devas esti rigardata kiel tre subjektiva prijuĝo.

La lingvo de ĉi tiu stimula verko estas entute bela, kaj la tradukinto per ĝi pruvis sian rajton viciĝi inter la unuarangaj de la modernaj literaturistoj Esperantistaj. Nur unu seriozan kritiketon mi volus direkti al lia uzo. La senescepta elizio ĉe *de l'*, cetere kontraŭ la spirito de la Esperanta prozo, iel impresas dialekte, kaj ofte —almenaŭ ĉe mi—difektas la ritmon de alie muzika, kantanta prozo.

• Verko eksterordinara kun bonaj papero kaj preso (fakte meritanta pli firman bindadon).

M.S.

***Jarlibro de U.E.A. 1951.** Unua Parto, 15×11.5cm., 256 p. Neaĉetebla, sed liverebla al individuaj membroj. Eld. U.E.A., Rickmansworth, Anglujo.

La nunjara eldono de ĉi tiu publikigaĵo ampleksas 8 paĝojn pli ol la antaŭa kaj aperis jam en Februaro. La enhavo kiel kutime: delegita adresaro (1985 en 60 landoj), sciindaĵoj oficialaj, informoj pri landaj asocioj aliĝintaj kaj nealiĝintaj, kaj pri kunlaborantaj fakaj organizoj, titolaro de esperanto-gazetoj kaj lastaperintaj verkoj, listo de mallongigoj k.t.p. Ĉi lasta aperis ankaŭ en la antaŭa eldono kaj mi demandas al mi, ĉu valoras denove enpresigi ĝin? Interesiĝantoj ja povas konsulti la jarlibron de 1950.

Inter la novaj libroj oni menciis ankaŭ *Esperanto, the world inter-language* (aperis en 1948) kaj *La vojoj estas nekonataj*, eldonita jam antaŭ la milito! Jen montriĝas denove, ke estas dezirinde, ke eldonejoj menciu sur la titolpaĝo la jaron de apero.

Riskante, ke oni trovos min iom kritikema, mi ne povas forsilenti, ke mi miris pri la foresto de membro-nombroj ĉe kelkaj asocioj (i.a. ĉe la dana kaj la jugoslava) kaj pri la “rondaj” ciferoj de iuj aliaj. Krome oni trovas ĉe kelkaj asocioj la saman nombron kiel pasintjare. Ĉu ne estus konsilinde, ke ĉiu asocio ĉiujare donu sian precizan nombron je difinita dato, ekz. je la unua de oktobro, por ebligi superrigardon pri la nombro da organizitaj esperantistoj en la plej gravaj landoj kaj por konstati eventualan kreskon aŭ malkreskon?

Akcenti la grandan valoron de ĉi tiu jarlibro por ĉiu praktika esperantisto ŝajnas superflue.

G. P. de B.

***Elementoj latinidaj en Esperanto:** de Franjo Modrijan, Ljubljana, Jugoslavujo. 18×16cm., 46 p., broŝ., prezo 2ŝil., afranko 2p.

La apero de la libreto de s-ano Modrijan ne estas ĵusa; sed ŝajne la eventoj de la lasta mondmilito malhelpis ĝian diskonigon.

Kiel la titolo diras, temas pri studaĵo montranta en kia mezuro Esperanto estas latinida lingvo. S-ano Modrijan faris bonan laboron; etimologiistoj kaj vorthistoriistoj certe ĉerpos el ĝi utilajn informojn.

Tamen ŝajnas al mi, ke la aŭtoro iris tre ekstreme en siaj konsideroj. Mi estas tute certa, ke novheleno povus montri, ke almenaŭ duono de

la vortoj diritaj latinaj de Modrijan, estas pli precize prahelenaj; ke franco, hispano, italo aŭ portugalo povus montri, ke Esperanto estas pli francida, hispanida, italida aŭ portugalida, ol latinida, ĉar ja Zamenhof kaj la posta lingvoevoluo multfoje prenis latinidajn terminojn, anstataŭ pralatinajn. Anglo, germano aŭ slavo trovas malpli da komunaĵoj, sed certe sufiĉajn por verki similtaman studaĵon. Ekzemplo plene pravigos miajn asertojn: sur paĝo 20 Modrijan metas:

Ankaŭ la sufikso *-id-* estas simila al la finiĝo latina en samsignifaj vortoj: *Danaïedes = Danai filiae = Danaidoj = filinoj de Danao*, same: *Dardanides, Nereides, Oceanides*; *Pelides = Pelei natus = Pelido*, *Atrides = Atrido* k.t.p.

Nu ĉiuj cititaj vortoj estas pure helenaj, tiom, ke ilin multfoje oni deklinacias en la latina literaturo laŭ la helenaj paradigmoj! Ja la sufikso *-id-*, se al ia lingvo parenca, certe ĝi estas tia al la prahelena *-id-*.

Preseraroj abundas; kaj tutplena aldona paĝo da korektoj neniel elĉerpas ilin, kio estas tre bedaŭra en libreto, kies ĉeftemo estas ĝuste la korespondo de vortoj inter lingvoj.

J. Régulo Pérez.

***Marista Terminaro** de Komandanto P. Clissold. Eldonita de U.E.A. 15 × 12cm., 62 p., broŝ., prezo 1ŝil. 6p.

En 62 malgrandaj paĝoj prezentas U.E.A. al la esperantistaro la *Marista Terminaro* kolektitan de komandanto Peter Clissold. Utila kaj altvalora por ĉiuj, tiu ĉi 10-a terminaro eldonita de U.E.A. plenumas vakan lokon en la esperantaj marprofesioj. Ni, ĉiuj esperantistoj kiuj kun la maro aŭ per ĝi vivadas, kiuj vojaĝas per la komfortaj modernaj ŝipoj—tiuj en

granda nombro—havas nun libreton kiu helpas multege la ĉiuspecajn rilatojn kun pasaĝeroj, ekiparo k.s.

Por la utilo, movado kaj vigleco de la lingvo esperanta mi sentas ke komandanto Clissold plenumis taskon kiun ni ĉiuj devas danki al li. U.E.A. publikigante la libreton de komandanto Clissold riĉigis la esperantan literaturon kaj helpis multege multnombrian sektoron de la esperantistaro.

Honestas estis la laboro de la aŭtoro, kiu, kiel li mem diras, pli difinis ol elpensis novajn vortojn. Esperanto estas jam plenaĝa kreaĵo de kelkaj jardekoj. Ĝi enhavas preskaŭ ĉiujn vortojn bezonatajn. La reguloj de tiu ĉi bela lingvo devos esti ĉiam kaj fundamente observataj tiamaniere ke por unu vorto unu signifo kaj por ĉiu objekto nur unu vorto. Tamen mineniam kontraŭstaras neologismojn kiam ili estas bezonataj, kaj en plena akordo mi proponas la akcepton de la malmultaj nun prezentitaj.

Carlos Henrique, ĉefkapitano.

Ricevitaj :

Esperanto : grandformata bril-kolora afiŝo reklamanta la 36-an U.K. en München. Eld. L.K.K.

Deklaro pri principaro : reklamfolio de la Socialista Partio de Granda Britujo. Havebla ĉe : 2 Rugby Street, London, W.C.1, Anglujo.

El Imperial : tutpaĝa artikolo pri Esperanto, en dec. numero de tiu grava gvatemala revuo.

Life & Vision : monata revuo pri vivreformo enhavas kurson de Esperanto. Redaktorino : Miss Mary E. Foley, c/o Austral Health Academy, 17 Elizabeth Street, Melbourne, Aŭstralio.

Niaj kunlaborantoj

Einar Adamson, Honora Membro de U.E.A. kaj Ĉefdelegito en Svedlando

LA sperto de S-ro Adamson estas sperto de miloj da samideanoj tra la mondo. Li aĉetis ŝlosilon kaj tuj konsciis, ke jen ĉemane estas la kontaktilo de la mondo. En 1911 li aliĝis al la Esperanto-klubo de Gefle kaj dum kelkaj jaroj estis en la estraro. Pro manko de gazeto li eldonis kunlabore kun Rudolf Persson en 1912 hektografitan gazeton *La Folio* kaj jam de 1913 helpis lin ĉe la presita gazeto *La Espero*, nuna *Svenska Esperantotidningen*. En 1923 S-ro Adamson iniciatis la fondon de Sveda Laborista Asocio kaj estis ties prezidanto ĝis 1931. De 1922 ĝis 1931 redaktis *Svenska Arbetar Esperantisten*. De 1946 li estas redaktoro de T.E.Ĵ.A.-Informilo, kaj en la antaŭ nelonge kreita Gazetara Servo de U.E.A. estas ĝia gvidanto. Dum pluraj jaroj li kontribuas artikolojn pri Esperanto al diversaj gazetoj kaj estas konata rubrikisto en *Freden* (La Paco) organo de Sveda Asocio por Paco kaj Arbitracio.

Ne nur en la sfero de ĵurnalismo Einar Adamson aktivis, kvankam tio estas komprenebla pro lia profesia intereso en tiu fako. Sur la tereno de propagando li viglis per prelegoj, kaj en Svedlando kaj eksterlande, kaj parolis pri Esperanto en 450 lokoj en sia patrolando. Li multe vojaĝis eksterlande kaj akiris vastan rondon de amikoj pro sia simpatia maniero kaj sinteno. Memorinda por la ĉe-estantoj en la Esperanto-Semajno en Zaandam 1947 estis kunveno en kiu oni prezentis Einar Adamson kaj lian ĉarman edzinon kiel la administrantojn de la sendado de nutraĵ- kaj vest-



pakojn en Nederlandon dum kaj tuj post la okupado. En la sekvinta ovacio oni povus supozi, ke la tegmento forflugos. Tio estas nur mencioto pri ampleksaj kaj sindonaj oferoj en la servo de la homaranismo flanke de nia sveda samideano kaj lia helpopreta edzino.

S-ro Adamson estas membro de U.E.A. de 1911 kaj diligente laboras kiel reprezentanto de tiu asocio. Modela estas lia perado de kotizoj kaj la kreskanta nombro da membroj en tiu lando estas sekvo de lia energia varbado.

M.S.

MUZIKA TERMINARO

M. C. Butler kaj F. Merrick
Prezo 9p. aŭ
3 int. respondkuponoj.
Mendu ĉe U.E.A.

Enigma Konkurso N-ro 57

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenberg 28, Brussel II, Belgujo

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 55.

N-ro 120 : sepalo, vaporo, ironia, pasero, perono, nadiro, dianto, potaso, teroro, romano, madono, tonelo, metano, kamero, komodo, domeno, makulo, komika, domaĝo.

N-ro 121 : bukedo, raketo, rostro, doloro, detalo, rabato, raboto, gorilo, pilolo, kabala, babila, boardi, empiro, krampo, kreola, bolido, masive, teraso, balteo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 53a konkurso : S-ro A. H. v. d. Broek (Ned.) 159 p., D-ro H. Steinberg (Germ.) 156 p., S-ro Fr. Kreutzberg (Germ.) 155 p.

Enigmo N-ro 125 : a - a - a - ar - ar - aŭ - be - bi - bo - bri - bu - ci - ci - ci - ci - di - di - di - dis - e - eks - fa - fak - fo - fo - fo - gi - go - go - gra - gro - gu - in - ki - ki - ko - ko - ko - ko - ko - ko - ksi - la - la - li - lis - lo - lo - lo - lu - ma - ma - ma - ma - me - me - men - mi - mi - mis - mor - mu - na - na - ne - ni - ni - no - no - no - no - no - nu - nun - o - o - o - o - o - o - o - om - pe - pep - pi - ra - ram - re - ro - ro - ros - sar - sen - skor - si - si - so - ta - ta - ti - ti - ti - ti - ti - tra - tra - tra - u - ul - ver - vo - zo - zo. El la ĉi-supraj 114 silaboj formu 25 vortojn, kies unuaj literoj formas proverbon. La signifoj de la vortoj estas : 1. kupra oksido, 2. solena malfermo, 3. entuziasmaj laŭdoj, 4. insularo, 5. legomo, 6. monumento, 7. muzikilo, 8. farbo, 9. somnambulo, 10. furaĝa herbo, 11. ŝtona ĉerko, 12. solene forpeli, 13. doloriga digesto, 14. aliformiĝo, 15. interkonsentita juĝonto, 16. deklinacia kazo, 17. veturilo, 18. scienco pri moneroj, 19. devizo, 20.

feliĉe finiĝanta dramo, 21. arbeto, 22. eksternormaĵo, 23. ekzakta reproduktaĵo, 24. kristana festo, 25. afektanta romanecan sentemon.

Enigmo N-ro 126 : La tuto konsistas el 76 literoj kaj estas elparolo de D-ro Zamenhof. 73-1-24-51-44-76-18-70-58=iu, kiu kredas, ke io realiĝos ; 59-2-55-14-29-7=tut-farita ; 66-75-4-43=malsama ; 13-62-28-42-33-30=apartenas al ĉiu popolo ; 65-10-32-53=kiamaniere ; 61-22-38-11-72-36-74-16-34=ne povas esti ŝanĝata ; 26-60-19-64-40-31-15-63-12=vidata ; 45-6-57-46-37=estas devigita ; 9-54-71=escepte de neniu ; 69-35-47-17=ekzisti ; 49-27-67=kun ankaŭ ; 52-41-68-56-20-21=interkompreniĝilo ; 48-5=en la direkto de ; 23-50-3-39-8-25=samaspekta.

Enigmo N-ro 127 : Metante la vortradikojn, difinitajn per la ĉi-subaj klarigoj unu apud la alia sub la numerojn 1 ĝis 36, tiel ke la lasta litero de iu radiko ĉiam estas la unua litero de la sekvanta, vi akiras radikĉenon, legeblan laŭ du direktoj. 1-4=korpoparto, 4-7=dorna herbaĉo, 7-9=ŝipriparejo, 9-13=legomo, 13-16=veturilo, 16-18=kaprica kutimo, 18-21=teatra verko, 21-23=utila kvarpiedulo, 23-25=tegmento-aperturo, 25-27=sangopumpilo, 27-29=kurba ostoj, 29-32=mangebla riverfiŝo, 32-36=veturilo, 36-34=ekstera krusto, 34-32=glazurbriligado, 32-29=ŝtofo, 29-27=frukto, 27-25=ŝtonego, 25-23=insekto, 23-21=eminenta kompetentulo, 21-18=tago, 18-16=konstruaĵo, 16-13=monato, 13-9=korpoparto, 9-7=leĝaro, 7-4=fabela besto, 4-1=hejtigaĵo. (Ensendis S-ro L. Vitali).

La nunjara kongreso de la Brita Esperanto-Asocio okazas en Ipswich, pri kiu urbo troviĝas mencio en la “Kronikoj de la Pickwick-a Klubo,” *Pickwick Papers* de Charles Dickens. Por ilustru la tute specialan stilon de Dickens kaj por festi la kongreson en Ipswich—jam famigita per la T.J.O.-kunveno antaŭ kelkaj jaroj—ni donas la jenan tradukon pri

La alveno de S-ro Pickwick en Ipswich

EN la ĉefstrato de Ipswich, maldekstraflanke de la vojo, nelongan distancon post trairo tra la malferma spaco antaŭ la Urbdomo, staras gastejo malproksime kaj vaste konata per la nomo Granda Blanka Ĉevalo, des pli elstara pro la ŝtona statuo de ia baŭmema* besto kun ampleksaj kolhararo kaj vosto, pale similanta frenezan tirĉevalon, kiu altas super la ĉefa pordo. La Granda Blanka Ĉevalo ĝuas famon en la distrikto laŭ tia grado, kia premiita virbovo, aŭ regione kronikita napo, aŭ nemanipuleble pufita porko—pro la ega granda. Nenie troviĝas tiaj labirintoj de sentapiŝaj trairejoj, tiaj aroj da ŝimaj, malbone prilumitaj ĉambroj, tiel grandaj nombroj da etaj fakoj en kiuj manĝi aŭ dormi, sub unusola tegmento, kiaj kune ariĝas inter la kvar muroj de la Granda Blanka Ĉevalo en Ipswich.

Ĉe la pordo de tiu ĉi trokreskinta trinkejo la Londona diligenco haltis je la sama horo ĉiuvespere; kaj de tiu ĉi sama diligenco S-ro Pickwick, Sam Weller, kaj S-ro Petro Magnus deiris en tiu specifa vespero al kiu la jena ĉapitro de nia historio havas rilaton.

“Ĉu vi intencas resti ĉi tie, sinjoro?” demandis S-ro Petro Magnus, kiam la strihava sako, kaj la ruĝa sako, kaj la brunpapera pako, kaj la leda ĉapelujo estis lokitaj en la koridoron. “Ĉu vi intencas resti ĉi tie, sinjoro?”

“Jes,” diris S-ro Pickwick.

“Nu, nu,” diris S-ro Magnus, “similan al ĉi tiuj eksterordinaraj

koincidoj mi neniam konstatis. Sciu, ke ankaŭ mi restos ĉi tie. Mi esperas, ke ni kune manĝos.”

“Kun plezuro,” respondis S-ro Pickwick. “Mi tamen ne estas certa ĉu, aŭ ne, mi havas amikojn ĉi tie. Ĉu ĉeestas sinjoro kun la nomo Tupman, kelnero?”

Korpulenta homo, kun dusemajne uzita servtuko sub la brako, kaj samperiode portitaj ŝtrumpoj sur la kruroj, malrapide lasis sian okupon, rigardadi laŭ la strato, je tiu demando de S-ro Pickwick; kaj detale esplorinte ties aspekton, de la ĉapelo-supro ĝis la plej malsupra el liaj ĝamaŝbutonoj, emfaze respondis—

“Ne!”

“Nek sinjoro kun la nomo Snodgrass?” demandis S-ro Pickwick.

“Ne!”

“Nek Winkle?”

“Ne!”

“Miaj amikoj ne alvenis hodiaŭ, sinjoro,” diris S-ro Pickwick. “Ni do duope manĝos. Montru al ni privatan ĉambron, kelnero.”

Post esprimo de tiu peto, la korpulenta homo dejnis† ordoni al la servknabo enporti la pakajaron de la sinjoroj; kaj antaŭirinte laŭ longa krepuskeca koridoro, enkondukis ilin en grandan kaduke meblitan salonon, en kiu malgranda fajro faris kompatindan provon ŝajni gaja, sed kiu estis rapide cedanta sub la melankolia influo de la loko. Post

forpaso de horo, iometo da fiŝo kaj bifesto estis servata al la vojaĝantoj, kaj kiam la manĝo estis forigita S-ro Pickwick kaj S-ro Petro Magnus altiris siajn seĝojn al la fajro, kaj mendinte botelon da kiel eble plej malbona portvino je kiel eble plej alta prezo por la bonfarto de la estro, trinkadis brandon-kaj-akvon por la bonfarto sia.

Tradukita de M.S.

(Apenaŭ necesas atentigi al eventualaj vizitantoj al Ipswich, ke tiu malĝoja bildo pri la bonveno en Ipswich tute ne kongruas kun la nuntempa realo, malgraŭ la "brita malabundo"! Ni deziras esprimi al East Anglian Magazine Limited nian plej sinceran dankon pro afabla prunto de la fototipio sur la kovrilpaĝo.—Red.)

* baŭmi=stari sur la postaj kruroj.

† dejni=iom nevolonte, cede, patronece agi.

Internacia Konkurso 1951

KIEL ankaŭ en la antaŭa tabelo, la tendencoj de la nuntempo reflektiĝas en la ciferoj nun prezentataj. La realiĝo de senprecedence granda nombro da membroj en la frua parto (eĉ antaŭ la komenco de) la jaro rezultigis grandajn atingojn de iuj asocioj. Estas precipe rimarkinde, ke duoble pli da konkursantoj ĉi-jare atingis pli ol 80% kompare kun la ciferoj je la sama periodo en 1950.

Aparte gratulinda estas la strebado de la "malgrandaj" landoj, kaj la sistemo de poentado montras ankoraŭfoje, ke eĉ tiuj havas egalan ŝancon en la amika konkurenco al plifortigado de nia movado.

INFORMO PRI SOCIALISMO

Socialismo estas la mondskala movado de la laborista klaso al emancipiĝo—la movado de laboristoj per mano kaj cerbo—la movado de ĉiuj kiuj laboras por salajro. Socialismo ankoraŭ ne estas aplikata—ie ajn—ĉar ĝin povas efektivigi nur matura laborista klaso. Rigardu la faktojn. Legu la *Deklaracio de la Principaro* (nun eldonitan por la unua fojo en Esperanto) de la Socialista Partio de Granda Britujo kaj ĝiaj parencaj partioj en aliaj landoj.

Skribu hodiaŭ por senpaga specimeno.

LA SOCIALISTA PARTIO
de

GRANDA BRITUJO

2 Rugby Street, London W.C.1, Britujo

pagita reklamo

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando ..	2000	2165	108.2
2.	Japanujo ..	800	865	108.1
3.	Germanujo ..	2400	2520	105.0
4.	Portugalujo ..	600	625	104.2
5.	Urugvajo ..	250	235	94.0
6.	Belgujo ..	2100	1889	89.9
7.	Italujo ..	1700	1525	89.7
8.	Sud-Afriko ..	250	225	89.0
9.	Britujo ..	12000	9705	88.7
10.	Danlando ..	2800	2445	87.4
11.	Svislando ..	1400	1205	86.0
12.	Izraelo ..	300	250	83.3
13.	Maroko ..	400	315	78.7
14.	Brazilo ..	2500	1949	78.0
15.	Hispanujo ..	1100	800	72.7
16.	Norvegujo ..	1400	960	68.6
17.	Nederlando ..	5000	3205	64.1
18.	Kanado ..	250	155	62.0
19.	Irlando ..	250	145	58.0
20.	Francujo ..	5700	3279	57.5
21.	Svedlando ..	5300	3000	56.6
22.	Aŭstralio ..	900	490	54.5
23.	Nov-Zelando ..	800	405	50.6
24.	Argentino ..	800	340	42.5
25.	Usono ..	3000	1186	39.5
26.	Kubo ..	250	85	34.0
27.	Aŭstrujo ..	1000	230	23.0
28.	Islando ..	500	20	4.0



Por via distro

Sendu vian plej bonan anekdoton al M. Otiel,
Universala Esperanto-Asocio, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Fido

Viro : Mi do luas la montritan ĉambron. Vi certe estos kontenta pri mi. Ĝis nun ĉiuj mastrinoj ploris, kiam mi forlasis la ĉambron.

Mastrino : Tio ne povos okazi ĉe mi. Ĉe mi vi devas antaŭpagi la luprezon.

Vidpunktoj

Amikino : Mi aŭdis, ke via filino edziniĝis, kaj ke ankaŭ via filo edziĝis. Mi gratulas vin.

Patrino : Dankon. Mia filino vere bone faris. Ŝi havas tre ĝentilan, karan edzon, kiu ĉiumatene alportas

al ŝi la matenmanĝon al ŝia lito kaj purigas la loĝejon. Mia Manjo eĉ ne devas movi fingron. Ŝi iras antaŭtagmeze butikumi kaj posttagmeze kartludas kun siaj amikinoj. Vere sinjorinan vivon !

Amiko : Kaj la edzino de via filo ?

Patrino : Ho, li malbone elektis ! Lia edzino estas terure mallaborema. Imagu, ŝi dormas matene ĝis la deka, matenmanĝas en la lito, nenion faras en la loĝejo, antaŭtagmeze promenadas kaj posttagmeze kartludaĉas kun siaj amikinoj !

(de P. Balkányi).

Kio estas via V.-K. ?

(Respondoj sur p. 122)

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustan el la signifoj donitaj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselecto aŭ nescio.

1. **Garni** : (a) tralavi la gorgon, (b) almeti ion kiel ornamaĵon, (c) malpaci, disputi ?
2. **Kolapso** : (a) disfalo, (b) subita sveno, (c) kolbrido ?
3. **Antagonisto** : (a) kontraŭulo, (b) kanajla sentaŭgulo, (c) iu loĝanta diametre kontraŭa al la loko, kie oni mem loĝas ?
4. **Stafeto** : (a) longforma peco el metalo, (b) sporta konkuro, (c) aro da superaj oficiroj ?
5. **Sledo** : (a) malsincero, (b) trinkaĵo, (c) glitveturilo ?
6. **Omaĝo** : (a) fino, (b) respekta donaco al iu, (c) unuo de elektra rezistanco ?
7. **Aŭroro** : (a) luma rondo ĉirkaŭ la kapo de sanktulo, (b) matena krepusko, (c) diino de ĉasado ?
8. **Jaĥto** : (a) luksa ŝipo, (b) ĉasado, (c) ĉevalaĉo ?
9. **Kompili** : (a) verki ne originale, (b) verki muzikaĵon, (c) trompi ?
10. **Babuŝo** : (a) hinda dancistino, (b) araba mantelo, (c) speco de pantoflo ?



ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj :

I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Dimanĉo	16.00–16.20	Roma. 25.20m., 42.19m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vitorio Veneto 56.
	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. P. Radiodiffusion Française, Lille (Nord), Francujo.
	14.30–15.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. I. (ĉiun duan lundon). V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35–17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 13.94m., sur 19.60m.
	23.30–23.45	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	21.35–21.40	Wien 513m., 25.48m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 347m., 48.39m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
Vendredo	16.00–16.20	Roma. Kiel dimanĉe.
Sabato	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Stacio K.R.O., Hilversum, Ned., volas scii, ĉu aŭskultantoj pli bone ricevas laŭ ondolongo 298m. aŭ 402m. Ĝi elsendis laŭ 298m. ĝis aprilo; de aprilo ĝis julio laŭ 402m. Nepre sciigu la instancojn !

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

36-a Universala Kongreso de Esperanto

München, 4-11 aŭg., 1951

Festaj aranĝoj : La Kongresa Balo, la Interkona Vespero kaj la Amuza Vespero okazos en la granda kaj fama Hofbräuhaus, reprezentanta tipan München-an bierejon.

Statistiko ĝis 27 feb. : Argentino 1, Aŭstrujo 20, Belgujo 20, Brazilo 4, Britujo 131, Ĉeĥoslovakujo 4, Danujo 19, Egiptujo 5, Finnlando 9, Francujo 118, Germanujo 432, Hispanujo 1,



Kastelo Neuschwanstein : ekskursloko en Sudbavarujo

Irlando, 3, Islando 1, Italujo 38, Jugoslavujo 7, Maroko 1, Nederlando 23, Norvegujo 9, Polujo 5, Portugalujo 1, Sarlando 10, Svedujo 47, Svisujo 16, Trieste 3, Sudafriko 1, Usono 9. Sumo 938 el 27 landoj.

Restadprezoj : La L.K.K. sukcesis aranĝi tre malmultekostan restadon. La amasrestejo estos en ordinara junulara gastejo (Jugendheim), en domoj kaj en grandaj tendoj en la kortoj. Oni ricevos tiel nomitan "usonan tendliton" kaj unu aŭ du litkovrilojn. Oni povos laŭplaĉe kunporti kroman lanan kovrilon, dormsakon aŭ littukon, kapkusenon kaj mantukon. Ĝi kostos GM 5.00 por 7 noktoj de la 4-a ĝis la 11-a aŭg. Kiuj venos antaŭ aŭ post tiuj datoj povos mem mendi liton ĉe alia junulara gastejo kaj tie pagi. La amasrestejoj troviĝas en diversaj partoj de la urbo. Por sinjorinoj estas rezervita speciala restadejo. Ne atendu lukson por tiu modesta prezo. Oni povas prepari sian propran matenmanĝon.


Komuna manĝado : apud la kongresejo en altlerneja manĝejo estos aranĝata komuna tagmanĝo tre malmultekoste de lundo ĝis sabato tagmeze (sed ne ĵaŭdon ĉar tiutage la tuta kongreso ekskursos). Do entute 9 kompletaj manĝoj (5 tag-, kaj 4 vespermanĝoj) por nur GM 7.50. Komuna manĝado eblas por ĉiu kongresano, ankaŭ por tiuj, kiuj loĝos en hoteloj. Mendu vian partoprenon en la komuna manĝado per aparta slipo aŭ poŝtkarto kaj pagu samtempe kun via loĝeja pago. **Mendo sen samtempe pago ne valoras.** Ni akceptas mendojn nur ĝis la unua de julio.

EKSPEDICIO

KON-TIKI

de Thor Heyerdahl

trad. de Brynildsen kaj kontrolita de Stellan Engholm



200 paĝoj
60 fotoj
16 × 23 cm.
bona papero
tola bindo

Rakonto pri vojaĝo de 6 viroj dum 101 tag-noktoj sur 14-metra trunkflosa laŭ la 8000 km. longa vojo de Peruo al Polinezio trans Pacifikon.

Prezo 27ŝ. afranko 6p.

Eldonita de

Eldona Societo, Stockholm

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**

Kio estas via V.-K.?

Respondoj (Vidu p. 119)

- (b) **Garni** signifas almeti ion kiel ornamaĵon.
- (a) **Kolapso** estas disfalo.
- (a) **Antagonisto** estas kontraŭulo.
- (b) **Stafeto** estas sporta konkuro.
- (c) **Sledo** estas glitveturilo.
- (b) **Omaĝo** estas respekta donaco al iu.
- (b) **Aŭroro** estas matena krepusko.
- (a) **Jaĥto** estas luksa ŝipo.
- (a) **Kompili** signifas verki ne originale.
- (c) **Babuŝo** estas speco de pantoflo.

Nia felietono :

La Alaska Stafeto

F. Omelka

IV. La volontuloj

LA malgranda hotelo en Unalaklik estis plenplena. Kaj ĉiam ankoraŭ venadis novaj viroj. Iuj staris ĉirkaŭ la ardigita forno, la aliaj sidis ĉe la tabloj. Ili atendis, ĝis venos la ŝerifo, kaj vigle interparolis.

“Mi estas vere scivola, kial li kunvokis nin,” diris la ĉasisto Finke.

“Eble aperis nova dekreto pri la plialtiĝo de la impostoj,” aŭdiĝis la tajloro Stilding, la eta vireto, kiu estis ĝusta malo de fortkorpulo Finke.

“Ne ĝenu min pri la impostoj,” grumblis la gastejestro. “Jam nun ili estas tiom altaj, ke mi ne scias, kie staras mia kapo.”

“Nu, nu, nur malrapide, Sam,” incitetis lin la tajloro. “Kiu fartas vere malbone, tiu ordinare ne plendas.”

“Nur staru por unu duonjaro sur mia loko !” faris zorgoplenan mienon la gastejestro. “Poste vi parolus alimaniere.”

“Eh, ĉiu el ni havas sufiĉe da propraj turmentaj zorgoj,” svingis per la mano Finke. “Kaj—ke mi ne forgesu—mia edzino alportis el vendejo ian panikan sciigon el Nome. Ĉu vi aŭdis pri la afero ?”

“Laŭdire furiozas tie ia epidemio,” informis kompleze la tajloro. “Kompreneble—mi ne scias, kio estas vero. Tio povas esti nur nova bluf. Vi ja scias . . . ni ĉiuj estas fermitaj inter kvar muroj, solidan laboron oni ne havas—kaj pro tio homoj fikcias diversajn sensaciajn informojn, por ke ni per ili amuziĝu.”

“Sed ne,” neis per la kapo la gastejestro, “io estos vero. La poŝtestro eĉ diris, ke tie mankas medikamentoj—aŭ io simila.”

“Nu, tio estus malbona,” diris pripenseme Finke.

La tajloro Stilding volis ekparoli pri ĉiuj malsanoj, kiujn li travivis, kiam malfermiĝis la pordo kaj en la ejon venis la ŝerifo de Unalaklik, brue salutata de la kunvenintaj viroj.

Li ekstaris antaŭ la bufedo, kaj kiam ĉiuj silentis, li komencis :

“Viroj ! Eble vi estas surprizitaj, ke mi kunvenigis vin tiom neatendite. Sed la afero estas tiom grava kaj urĝa, ke mi ne povas prokrasti ĝin.”

La ĉeestantoj fariĝis pli atentemaj.

“Eble vi jam aŭdis, ke en Nome aperis difterio. Doktoro Welch bezonas kiel eble plej baldaŭ freŝan seron. Li mendis ĝin en Seattle. La aeroplano alportis ĝin al Anchorage, sed pluen ĝi ne povis flugi. En tiu ĉi momento la paketo estas survoje al Nenana, kien ĝi verŝajne estos alportata hodiaŭ tagmeze. Sed temas pri tio, kiamaniere transporti ĝin el Nenana al Nome.”

La ŝerifo rigardis la virojn, kvazaŭ li atendus ilian proponon.

Ĉiuj silentis. Nur de la tablo, kiu estis ĉe la forno, aŭdiĝis malkuraĝa voĉo :

“Malfacila afero !”

“Doktoro Welch pripensis ĉiujn cirkonstancojn,” daŭrigis la ŝerifo. “Kaj fine li konstatis, ke estos necese aranĝi stafet-veturon. Hodiaŭ mi ricevis de li telegramon.”

Kiam li finlegis ĝin, la salono silentis. Sed nur momenton. Ĉar tuj poste aŭdiĝis kelkaj ekkrioj :

“Tio estas neeblo !”

“En tiu ĉi vetero, kiam ni eĉ hundon ne elpelus—en Nome-n ?”

“Absoluta frenezeco !”

“Oni facile diras : aranĝu stafeton ! Sed kiu veturos ?”

“Tio estus certa mortveturo !”

La salono bruis kiel vespa nesto.

La ŝerifo staris ĉe la bufedo kaj li observis per rigida rigardo la ŝtormon de indigno, kiun vekis lia komuniko. Post kelkaj momentoj li tintigis la glasojn. La kunvenintoj denove trankviliĝis.

“Vi pravas, amikoj,” kaj li elparolis la vorton, “amikoj” kun tiom malvarma akcento, ke ĉiuj tuj divenis, kion la ŝerifo sentas. “Ĝi aspektas vere kvazaŭ absoluta frenezeco, kaj kiu partoprenos la stafetveturon, tiu devos esti preparita por ĉio. Sed ĝuste pro tio neniu estas devigata. La aliĝoj estas memvolaj.”

“Feliĉe !” respiris iu duonlaŭte.

La ŝerifo ne lasis sin ĝeni kaj daŭrigis :

“Kaj tial mi demandis vin : kiu memvole aliĝas por veturigi la paketon da sero el Unalaklik al Nome ?”

La silento, kiu ekregis post tiu ĉi demando, ne estis interrompita eĉ per unu vorto. Kelkaj viroj klinis la kapon, ĉar ili volis eviti la esploran rigardon de la ŝerifo. La aliaj scivole ĉirkaŭrigardis tra la superplenigita salono. Sur kelkaj vizaĝoj aperis malrespektaj ridetoj.

Kaj en tiu hontiga silento aŭdiĝis de malantaŭe la klara, kvazaŭ metala voĉo :

“Mi !”

Ĉiuj surprizite rigardis malantaŭen.

Kiel ? Ĉu Gunnard Kasson ? Tiu longstatura viro kun malgrasa vizaĝo kaj severe kuntiritaj trajtoj, kiu alvenis ĉi tien kun edzino kaj du infanoj antaŭ kelkaj jaroj el Finnlando ?

Jes, estis li. Dum la tuta agado li ne parolis eĉ unu vorton. Ĉiujn rimarkojn li per unu orelo aŭdis kaj per la dua ellasis. Li staris en la angulo neparolema kaj profunde meditanta. Li aŭdiĝis nur tiam, kiam oni devis paroli koncize kaj reale.

Ili atakis lin kvazaŭ vespoj.

“Vi . . . ! Ĉu vi scias, kion tio signifas—veturi en tiu ĉi vetero al Nome ?”

“Mi scias.”

“Kaj ĉu vi scias, ke vi devos atendi pli facile morton, ol revenon hejmen?”

“Jes.”

“Vi forgesas vian familion!”

“Ne.”

“Kion faros ĉi tie viaj infanoj sen vi? Videble, kiom vi amas ilin! La bona patro zorgas antaŭ ĉio pri sia propra familio!”

“Jes, kaj li pensas pri siaj infanoj!” insistegis alia.

Sed tio estis jam ankaŭ por la trankvileca Gunnard Kasson tro multe. Li paŝis antaŭen kaj stariĝis apud la ŝerifo. En liaj okuloj ekbrulis stranga fajreto.

“Vi rememorigis miajn infanojn. Nu, ĝuste je ili mi pensis la tutan tempon, kiam la ŝerifo rakontis al ni pri la tragedio en Nome. Kaj se mi aliĝas al la veturo, mi faras tion nur pro tio, ke mi amas miajn infanojn. Mi povas imagi al mi, kion ni ĉiuj sentus, se la epidemio furiozus ĉe ni, kaj se ni estus devigataj—same kiel nun la Nomeanoj—atendi la helpon de aliaj homoj. Tiam mi ŝatus aŭdi viajn rimarkojn pri la bravaj viroj, kiuj timante pri sia propra vivo pasive alrigardis, kiel dekoj da infanoj balanciĝas inter la vivo kaj morto! Sed nun mi volas aŭdi jam nenion—kaj precipe ne pri mia familio. Mi aliĝis kaj mi veturos.”

La ĉeestantoj eksilentis. La viroj embarasite ĉifis siajn ĉapojn. Ili klinis la kapojn kaj nekompreneble murmuris. Gunnard Kasson donis al ili fortan baton.

Kaj denove ekparolis la ŝerifo:

“Kiu volas veturi kun Kasson?”

Preskaŭ ĉiuj manoj leviĝis alten.

La ŝerifo ridetis. Kaj el lia voĉo perdiĝis ĉia malvarmo, kiam li daŭrigis:

“Ĝi estis nur malgranda ruzo mia, amikoj, kaj vi certe pardonos min. Efektive—Kasson veturos sola. Mi volis nur konvinkiĝi, ĉu antaŭ mi staras viroj aŭ malbravuloj. Mi ja en la animo jam decidiĝis, ke mi rezignos mian oficon kaj mem veturos. Ĉar ne estus tre granda honoro gvidi komunumon, kies viroj ne scias sian devon.”

Kaj sin turninte al Kasson, li aldonis:

“Mi dankas vin, Kasson! Mi dankas vin nome de la infanoj el Nome. Kaj nome de la infanoj de la tuta mondo.”

Kiam li premis la manon de Kasson, en la salono eksonis aplaŭdo. Fine ekestis preskaŭ konflikto pri tio, kiu veturu. Sed ĉar Kasson aliĝis la unua, estis interkonsentite, ke li veturos.

Ĉiuj ariĝis ĉirkaŭ li kaj donis al li la manon. Ili ekhontis pro tio, ke ili havis tiom malmulte da kompreno pri la suferado de siaj proksimuloj. Ilin turmentis la riproĉoj de la konscienco pro la egoismo, kiu kaptis ilin dum kelkaj momentoj. Ili klopodis rebonigi sian eraron almenaŭ per tio, ke ili konsilis al Kasson, kiamaniere li devos prepari sin por la danĝera veturo.

Intertempe la ŝerifo rapidis al la poŝtoŝeĉejo.

Kaj post kelkaj minutoj flugis al Nome la ĝojiga raporto. Ĝi estis ja konciza, sed en ĝi kuŝis la tuta beleco kaj fiereco de la homo :

“Unalaklik preparita. Veturos Gunnard Kasson.”

La saman tagon akceptis Nome ankoraŭ kvar telegrafajn depeŝojn :

“Ruby—preta. Leonard Seppala.”

“Hot Springs—preparita. Emil Erikson.”

“Tolovana. Iras Wurd Kalland.”

“Nenana. La kontakto kun Tolovana funkcias. Veturas Will Shannon. *Li ekvojaĝis hodiaŭ tagmeze.*”

Doktoro Welch iris antaŭ vespero al la poŝtoŝeĉejo. Denove li travivis tagon de streĉa laboro. La epidemio disvastiĝis per nekredebla rapideco. En ĉiu horo estis anoncataj novaj kaj novaj malsanuloj. Krom Kudlago jam mortis ankoraŭ du pacientoj.

Li venis al la poŝto en tiu momento, kiam la oficisto Smith transskribis la lastajn signojn de la Mors-alfabeto. Doktoro Welch malpacience ekprenis la telegramon el Nenana kaj legis ĝin. Post finlego ekbrilis en liaj okuloj varmegaj larmoj. La larmoj de admiro kaj dankemo.

Ili jam veturas !

Ili jam venigas la savon ! Ili venigas la vivon por dekoj da minacataj infanoj ! Ke ili alvenu ĝustatempe !

Li rigardis al la urbo.

Al li ŝajnis, kvazaŭ la nigra ombro de la morto fariĝas pli hela, pli malforta, kvazaŭ ĝi leviĝas super la tegmentojn de la domoj. Sed poste ĝi restis staranta, kaj kvazaŭ fiksita ĝi pendis super la urbo.

Doktoro Welch ekstremis. Li konsciiĝis, ke la danĝero estis plimalgrandigita, sed tute ne forigita. La sorto de la urbo Nome kuŝas en la manoj de kelkaj kuraĝaj viroj.

En la manoj de stafeto.

Ĉu ĝi alvenos ?

(daŭrigota)

MAKSIMOJ de La Rochefoucauld

(unu el la plej grandaj klaŝikuloj francaj)

Traduko de Prof. G. Waringhien

Teksto en ambaŭ lingvoj ; 112 p., 22 × 14 cm.

Mendu ĉe Universala Esperanto-Asocio aŭ ĉe via enlanda libroservo

Prezo 3ŝil., aŭfranko 3p.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 236.

3-an de Marto 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Februaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	2577	2733
Individuaj membroj :		
MJ	444	516
MA	2917	3256
MS	227	224
Patronoj ..	14	15
DM	194	209
HM	56	58
	— 3852 —	— 4278 —
	6429	7011

DELEGITOJ

Aŭstralio

Sydney. FD (Kont-scienco) : vakas.
FD (Reklamado) : C. Hickey, P.O. Box 18, Mosman, N.S.W.

Aŭstrujo

Innsbruck. FD (Literaturo) : vakas.

Belgujo

Bruxelles. FD (Vegetarismo) : L. De Bruyne, Médoristraat 54, Brussel II.

Rumbeke. D : A. Van Leuven, Spanjestraat 76.

Brazilo

S. Miguel Paulista (S.P.). D : O. Moreira Barros, Caixa Postal 100.

Britujo

Bristol. FD (Katolikismo) : J. C. D. Smith, 125 Cromwell Road.

Burnley. FD (Katolikismo) : vakas.

Bury. D : vakas.

Troon. D kaj VD : vakas.

Danlando

Hvissinge. FD (Instruado) : W. Petersen, Mtr. 39, Hvissinge pr. Glostrup.

Finnlando

Janakkala. FD (Padelado) : I. Kanerva, Tervakoski, Apteekki. Tel : 444.

Lempäälä. D : vakas pro morto.

Tampere. VD kaj FD (Komerco) : vakas.
Tampere-Härmälä. FD (Kristanismo libera) : A. Vuoririnne, Timonkatu 1. B. 2.

Toijala. VD : S-ino E. Ojanperä, V-piiri.

Francujo

Strasbourg. FD (Doganaj aferoj) : M. Perrier, 25 Route du Rhin, Strasbourg Neudorf.

Germanujo

Berlin. FD (Fotografio) : J. Gross, Tulpenstr. 7, Berlin-Lichterfelde-W.

Freiburg i/B. D : A. Diener, Glümerstr. 29, Freiburg Breisgau.
FD (Poŝto) : La D.

Hispanujo

Manresa. D : A. Llobet, Pl. Mayor 20.

Zaragoza. FD (Oraĵistaj aferoj) : A. Ballestin, Boggiero 142-2.

Hongkongo

Hongkong. D : Luk Ki-ngok, c/o Bank of East Asia Ltd.

Irlando

Dublin. FD (Ŝakludo) : vakas pro morto.

Italujo

Bologna. VD : G. Zacconi, Piazza Medaglie d'oro 3.

Sampierdarena. D : vakas pro morto.

Varazze. VD kaj FD (Turismo) : vakas pro morto.

Jugoslavujo

Zagreb. FD (Akvokonduko) : vakas.
FD (Arkeologio) : M. Gjivoje, Vodnikova 19.

FD (Filatelo) : V. Babić, Vončinina 7, Zagreb II.

Nov-Zelando

Tauranga. D : R. J. Clarkson, 8 Norris Street.

FD (Komerco—spicaĵoj) : La D.

Portugalujo

Barreiro. VD : J. A. Neto, Av. da Republica 32.

FD (Maraj sportoj) : A. Bravo Marinho,
Rua Miguel Pais 76.

Rodezio

Umtali. D : R. Harding, P.O. Box 137,
Umtali, S. Rodezio.

Svedlando

Älvängen. D : A. H. Tähtinen, Knaptorp
(422).

Ekshärad. D kaj FD (Kristanismo) : vakas.

Koskullskulle. D : F-ino E. Isaksson,
Lärarbostaden. Tel : 109.

Söråker. D : R. Moholm, Box 345. Tel : 292.
FD (Ĝardenkulturo) : La D.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

F-ino O. Robotham; Stockton-on-Tees,
Anglujo

PATRONOJ 1951

15. Tucker, A. G., Canterbury, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

186. Bishop, W. O., London, Anglujo

187. Hill, A., Birmingham, Anglujo

188. Relf, E. F., Bletchley, Anglujo

189. Carrfors, H., Alsten, Svedujo

190. Fejde, M., Nässjö, Svedujo

191. Braga, I. G., Rio de Janeiro, Brazilo

192. Pinto do Carmo, J. de A., Rio de
Janeiro, Brazilo

193. Carvalho, A., Bebedouro, Brazilo

194. Dionisio, C. H., S. Leopoldo, Brazilo

195. Morais, A. de, Rio de Janeiro, Brazilo

196. Piauhi, J. N., Rio de Janeiro, Brazilo

197. Treude, W. München, Germanujo

198. Otheguy, H. C., Buenos Aires,
Argentino

199. Iglesias, E., Buenos Aires, Argentino

200. Catalano, M. H., San Isidro, Argentino

201. Frode, O., Göteborg, Svedujo

202. Turner, F., Linköping, Svedujo

203. Stenström, J., Ulricehamn, Svedujo

204. Benedetti, J., Marrakech, Maroko

205. Fraser, F-ino R., Ilford, Anglujo

206. Marlier, J. M., Dakar, Fr. Ok. Afriko

207. Niven, F-ino I. H., Alderley Edge,
Anglujo

208. Halbedl, A., Knittelfeld, Aŭstrujo

209. Höfert, F., Wien, Aŭstrujo

210. Knol, G. T., Coevorden, Nederlando

211. Redhead, R., Victoria, Kanado

212. Carrfors, S., Bromma, Svedujo

213. Olsson, O., Lund, Svedujo

214. Klytides, S., Nicosia, Cipro

215. Garraway, F-ino E., Sheffield, Anglujo

216. Haxton, J. T., St. Andrews, Skotlando

217. Taylor, J. R., Westerham, Anglujo

218. Taccani, L., Milano, Italujo

219. Gibson, W. A., Bathgate, Skotlando

220. Langman, D. J., Birmingham, Anglujo

221. Marchand, F-ino M., Paris, Francujo

222. Petit, P., Rosny-sous-Bois, Francujo

223. Spitz, R., Strasbourg, Francujo

224. Friess, F-ino E., Paris, Francujo

225. Cooper, S-ino H. V., Bromley, Anglujo

226. Luty, F-ino M., Clough Fold, Anglujo

227. Blöndal, B. P., Hvammstanga, Islando

DONACOJ. F-ino M. Malley 1ŝ., W.
Cunningham 5ŝ., S-ino E. Walker, 2ŝ.,
F-ino M. F. Clark 5ŝ., F-inoj B. Hoyle
2ŝ. 6p., F. W. Crofts 20ŝ., J. Course 100ŝ.,
A. J. Weber, 3ŝ., H. Wehrheim 7ŝ. 6p.,
S. W. Hicks 4ŝ., A. Vieira Araujo 14ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Esperantista Vivo

Edziĝo

Spaans-Tiessen ; F-ino Anjo Spaans. D.
de U.E.A. en Oosterend (Texel) kaj S-ro
Thijs Tiessen, D. de U.E.A. en Den Burg
(Texel) Nederlando, 10 marto 1951.

Sinceran gratulon !

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj
samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi
nian profundan kondolencon.—Red.

Clavenna, S-ro A., D. de U.E.A. en
Sampierdarena, Italujo, 24 feb. 1951.

Ford, F-ino Nesta, 2 Marton 1951 en
Bournemouth, Anglujo. DM de U.E.A. kaj
malavara subtenanto de la movaĉo.

Kristensen, S-ro Gunhardt, en Horsens,
Danl., 59-jara. fervora laboranto dum 40
jaroj.

McCormick, S-ro F. R. A., en Dublin,
Irlando, 55-jara. FD. de U.E.A. Konata
pro sia kunlaboro kun Prof. W. Brown en la
traduko de *Pri la origino de l'homo* (Sir A.
Keith). Mortis en januaro 1951.

Rasku, S-ro Antti, 71-jara, D. de U.E.A.
en Lempäälä, Finnlando, 9 feb. 1951.
Fervora propagandisto kaj instruisto de
Esperanto.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Esperanta Sanulejo estas fondota. kie oni povas vivi kaj lerni plejeble fariĝi centjara. Kiu sendos donacon por la sanulejo povos demandi laŭplaĉe. Volonte respondos D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

Manuel Vidal, Visitación 27, Valencia, Hispanujo, dez. korespondi hispane aŭ esperante pri kampado; interŝanĝi bildkartojn kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondas.

Itala Fraŭlino, 22-jara, deziras korespondi tutmonde. Rosa Carbone, Via Giuseppe Verdi 18, Sesto San Giovanni (Milano), Italujo.

Anglujo. Malgranda gastejo fronte kontraŭ maro. Apud Dover. Esperanto parolata. S-ino Perry, 54 The Downs, Herne Bay, Kent.

AAAAAAAAAlt ! Legu Jarlibron pĝ. 55.

Turisma servo : Rezervas malmultekoste hotelĉambrojn en okcident-Eŭropo, prizorgas gvidadon, turismajn prospektojn (afranku filatele). Loeckx, Konijnenperken 109, Brussel-Bosvoorde, Belgujo.

25-jara fraŭlo (lernanto) deziras korespondi kun fraŭloj tutmonde. Skribu al BM/KYHN, London, W.C.1, Anglujo.

200 gegrupanoj deziras korespondi kaj interŝanĝi il. gaz., pm., pk., kun ĉiuj landoj; nepre garantias respondon. Koresponda Grupo, Oka Shinmachi 260, Hirakata, Osaka, Japanujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika informejo, Sekretario Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Infanaj desegnaĵoj petataj por internacia ekspozicio. Nouais, 28 Boulevard Descazeaux, Angers, Francujo.

Deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj; nepre respondos: S-ro Norman Burroughs, 96 Shakespeare Avenue, Bath, Anglujo.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn laŭ bazo Yvert 1951. Mi petas, ne sendu antaŭe ĉar ni devas fiksi la kondiĉojn. Leo Grosskopf, pneŭmatikriparejo, Sechshauserstr. 99, Wien XV, Aŭstrujo.

Esperanta Ferio en Londono. 23a ĝis 30a de Junio, 1951, dum la Festo de Britujo. Kosto de aliĝo, lito kaj matenmanĝo en bona hotelo, kaj oficialaj ekskursoj £8. Plusaj privataj elspezoj minimume £4. Nur Esperanto parolata. Plena programo. Partoprenantoj limigitaj je 30. Skribu tuj al la Feria Sekretario, Londona Esperanto-Klubo, Fred Tallent Hall, 153 Drummond Street, London, N.W.1.

Letervesperon 8-V-1951 aranĝos E-klubo en Strakonice. Skribu multnombre al s-ro Blažek, Strakonice I, Ĉechova, Ĉeĥoslovakujo. Respondo garantiita.

Korespondi kun tuta mondo, precipe kun ruĝaj, brunaj kaj nigraj samideanoj, deziras Ĉeĉelin, Strakonice I—613, Ĉeĥoslovakujo.

Cambridge Grupo deziras Esperantaĵojn por mezmaĵa ekspozicio. Certa respondo. Leslie, St. Catherines College, Cambridge, Anglujo.

S-ro Tage Borgström, Västerångsgatan 7, Nybro, Svedujo, deziras korespondi pri abelbredado kun abelbredistoj de la tuta mondo.

José E. Pedraz y Palacio, Marqués de Urquijo 19, Madrid, Hispanujo, deziras scii pri malnovaj antaŭmilitaj geamikoj; ankaŭ interŝanĝas ilustritajn kolorigitajn poŝtkartojn, kun poŝtmarko sur bildflanko.

Agustin J. Palacios, E. S. Zeballos 20, Rosario, Argentino, deziras interŝanĝi il. poŝtkartojn senkovertajn kun samideanoj en Francujo, Nederlando, kaj landoj en Orienta Eŭropo. Nur aerpoŝte. Tujan respondon al ĉiu skribinto.

25-jara esperantisto deziras korespondi pri diversaj temoj kun la tuta mondo. Certa respondo. S-ro V. E. Drastic, Kyeemagh Avenue, Rockdale Host, N.S.W., Aŭstralio.

Spertajn kursgvidantojn por la sezono Septembro 1951—Majo 1952 serĉas Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo, Norvegujo.

Maja ekspozicio en Ŝtata Lernejo. Sendu bele afrankitajn kartojn, leterojn, esperantaĵojn. Certa respondo. Profesorino Adelaide Antonelli, Scuola Media, Via Col di Lana, Roma, Italujo.

KION VI SCIAS PRI LA FRUAJ TAGOJ?

Jen kelkaj helpaj libroj

Leteroj de L. L. Zamenhof

Prezentado kaj komentado
de Prof. G. Waringhien

1a volumo, 1901–1906

388 paĝoj

2a volumo, 1907–1914

374 paĝoj

21 × 14.5cm.

binditaj

Ĉiu vol. 21ŝ. 6p.,
afr. 9p.

Eldonita de S.A.T.

Originala Verkaro


Kompilis J. Dietterle

Preskaŭ ĉio kion verkis
originale D-ro Zamenhof

606 paĝoj Bele bindita

Prezo : 25ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonita de F. Hirt & Sohn



Vivo de Zamenhof

Edmond Privat

Bindita, ilustrita

Prezo 5 ŝil., afranko 4p.

*La libro, kiun ĉiu
Esperantisto devus
posedi*

Eldonita de E.P.C.

La Esperanto- Movado

Ĝia historio,
organizo kaj
nuna stato.

C. Støp-Bowitz kaj
J. R. G. Isbrucker

64 paĝoj, broŝ.

Prezo : 3ŝ. 6p., afranko 4p.

Eldonita de
Esperantoforlaget, A.S.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS., ANGLUJO